



1987 septembro
80a jaro
n-ro 981 (9)

aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun un kaj unesko)
sidejo: nieuwe binnenweg 176 • 3015 bj rotterdam • nederlando



Enorma,
tutmonda
jubilea
kongreso
en Varsovio



Vi trovos

jam la sepdekduan provon speguli en niaj paĝoj tiun unikan beston, la Universala Kongreso de Esperanto. Ni fakte sentas nin kiel tiujn famajn blindulojn, kiuj provis priskribi elefanton surbaze de ĉirkaŭpalpado, sen ajna ebleco vidi la tuton. Iom elefanta efektive estis la Jubilea Kongreso — sed ni mem kovas certan ŝaton por tiuj masivaj, iom malgraciaj sed ĉiam imponaj bestoj. Agrablan ĉirkaŭpalpadon ankaŭ al vi, pere de nia paĝdudeko!

Kiel kutime, iuj eroj maltrafis ĉi tiun numeron — i.a. raporto pri la eĥoj de la kongreso en la amaskomunikilaro. Varsovio sendube superis ĉiujn antaŭajn kongresojn tiurilate: ne malpli ol 145 ĵurnalistoj akreditiĝis, inkluzive de mondkonataj agentejoj kaj kompanioj, kaj en Pollando mem estiĝis vera informa inundo. Pli pri tio en oktobro, kie apud aliaj jubileaĵoj atendas vin la rezultoj de nia konkurso pri la nombro de esperantistoj...

Cetere, pardonpetojn al ĉiuj pro la katastrofa fototekniko en nia lasta numero. Vi facile komprenos, ke neniuj ĝeniĝas pro tio pli ol ni! En tiuj kazoj, estas ĝuste la komprenemo de la legantoj, kiuj skribas al la redaktoro aŭ alparolis min en Varsovio, kiu kuraĝigas min daŭrigi en ĉi tiu ne malofte frustra posteno. Al ili, apartan dankon! Kaj... ne gravos, se vi devos atendi la venontan numeon dum unu-du pliaj semajnoj, ĉu ne? Ankaŭ redaktoroj bezonas ferii! Ĝis la bunta oktobra!

Enhavo

- 149 72a Universala Kongreso de Esperanto: Varsovio: Manifestacio pri miraklo
- 150 Solena Inaŭguro: Historia, impona, tutmonda
Parolado de la Alta Protektanto: "Via movado fariĝis ankaŭ la mia"
- 152 Telegramo de la Ĝenerala Direktoro de Unesko
- 154 Bjalistoko: Manifestacio por interhoma solidareco
Deklaro de Bjalistoko
- 155 Parolado de la Prezidanto de UEA: Venas nun la periodo de disvastigo
- 156 Kongresa Konkurso de la Pola Radio
Dua Kongresa Rezolucio: Disvastigi la uzadon de Esperanto
- 157 Arta programo: La kongresa temo realiĝis pli praktike ol teorie
- 158 Tria Kongresa Rezolucio: Diskonigi kaj plifortigi niajn kulturajn atingojn
- 161 Tago de la Paco: Premio Deguĉi "por Afriko"
Tago de la Lernejo: Humuro, dramo kaj informado
Belartaj Konkursoj de UEA 1987
- 162 Internacia Kongresa Universitato: Jubilea rekordo
4a Kooperativa Konferenco: Modela utiligo de la UK
Esperantologia Konferenco: Atingis maksimumon
- 163 Terminologia Esperanto-Centro fondita
- 164 Komitataj kunsidoj: Novaj estrarano, institucio; malnovaj diskutoj
Bjalistoka Esperanto-Centro je la nomo de Zamenhof?
- 165 Unua Ĝenerala Kunsido
- 166 Solena Fermo: La iel-tiela kompletiĝo
Kelklinie pri... (mallongaj kongresaj notoj)
- 168 Kongreseroj... (gajaj kaj similaj piednotoj)

La kovrilo

Ni spertis samajn problemojn en nia revua montrofenestro, kiel en la ĉefartikola varopriskribo: nome, kiun varon elekti por reklamado? Varsovio ne estis simple la plej granda Universala Kongreso — ĝi havis kelkajn tute proprajn ecojn, ne laste la devigan rolon de la centra Jubilea aranĝo. Do, ni elektis mozaiki... sen tro cerbumi pri tio, kiu flanko plej meritas elstarigon. Finfine ĉiu kongresano pasigas unikan kongreson!

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio.

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Fondita en 1905 de M.P. Berthelot (1881-1910); **establita** kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920). **Legata** en 105 landoj. **Voĉlegata** por blinduloj.

Redaktoro: Mark Fettes.

Abonprezo: varias laŭlande (gld. 44,50; US\$ 21; GM 39; enoj 3300 ktp); petu informojn ĉe via landa asocio aŭ de la ĉisuba adreso. Unuopa ekzemplero kostas 4,00 guldenojn.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 1 400, 1/2 p. 740, 1/4 p. 400, 1/8 p. 240, 1/16 p. 150. Instancoj kaj entreprenoj de la Esperantomovado rajtas rabaton de 50%. Eksterakovrilaj anoncoj kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.

Adreso de UEA: Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Telefono: (010) 436 10 44 kaj 436 15 39.

Telekso: 23721 uea nl.

Telegramoj: ESPERANTO ROTTERDAM.

Banko: Bank Mees & Hope, Postbus 749, NL-3000 AS Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804). **Nederlanda poŝta ĝirkonto:** 37 89 64 (UEA).

Estrararo de UEA

Prezidanto (planado, Jubileo): d-ro Humphrey Tonkin, Office of the President, State University College, Potsdam, NY 13676, Usono; tel. (315) 265-6744; telekso (5) 9103500242 ud.

Vicprezidanto (Gvidas eksteran agadon): s-ro Grégoire Maertens, Prins Leopoldstraat 51, B-8310 Brugge, Belgio; tel. (50) 35 49 35

Vicprezidanto (interna kaj ekstera agadoj): s-ro Yosimi Umeda, 2-15-10 Aobadai, Meguro-ku, Tōkyō, 153, Jap.; tel. (3) 770 64 86; telekso 02655177 eki j.

Ĝenerala sekretario (interna agado): d-rino Flóra Szabó-Felső, Zója u 5/b VII.22, H-7624 Pécs, Hungario; tel. (72) 23 274.

Estrarano (ekstera agado): d-rino Barbara Despiney, 21 rue des Cuverons, F-92220 Bagneux, Fr.; tel. (1) 46 65 22 16.

Estrarano (financoj): s-ro Gian Carlo Fighiera, Juan Ramón Jiménez 28, 6ªA, E-28036 Madrid, Hispanio; tel. 250 39 87; telekso 42188 omt e.

Estrarano (ekstera agado): prof. d-ro Ottó Haszpra, Rosenberg házaspár u. 5, H-1054 Budapest, Hung.; tel. (1) 316 423; telekso 225931 muegy h.

Estrarano (interna agado): s-ro Diccon Masterman, "Quasi in Cima", Via di Cecina 610, I-55029 S. Stefano di Moriano (LU), Italio; tel. (583) 570 66.

Estrarano (gvidas internan agadon): s-ro Jean-Louis Texier, 27 chemin des Carreaux, Cerny, F-91590 La Ferté Alais, Francio; tel. (1) 64 57 66 53.



72a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO, VARSOVIO, 1987 07 25 - 08 01

Varsovio: manifestacio pri miraklo

La statistikoj parolas por si mem. 5946 homoj el 73 landoj venis al Varsovio inter la 25a de julio kaj 1-a de aŭgusto ĉi-jare, por festi kune la centjariĝon de Esperanto en brila, ĥaosa, neforgesebla semajno. Vole-nevole, ĉi tiu 72a Universala Kongreso de Esperanto fariĝis monumento kaj simbolo. La urbo kiu atestis la naskiĝon de la lingvo gastigis la jubileon de la Movado; kaj, kvazaŭ konscia pri sia rolo, la kongreso mem iel sukcesis speguli nian malfacilan sed dinamisman, krizoplenan sed finfine mirakle vivipovan historion.

Temas unuavice pri la plej granda Esperanto-kongreso iam ajn. Ne nur pro la nombro de partoprenantoj: la programo de la 72a UK estis sendube la plej riĉa, la plej bunta, la plej ambicia el ĉiuj ĝis nun. 23 prelegoj en la Kongresa Universitato, modela Esperantologia Konferenco, pli ol kvardeko da fakaj kunvenoj kaj vere vasta aro de artaj aranĝoj, inkluzive de teatraĵoj, filmoj, koncertoj kaj improvizaĵoj, abunde atestis pri la vigleco de tiu "internacia kulturo", kiun la kongreso teme festis.

Kaj tamen... la "spirito" de Varsovio nur mallonge, ka-price vizitadis la prelegejojn kaj teatrojn. Kredeble ĝi deĵoris dum pli da tempo al la kunsidoj kaj kunvenoj. Certe ĝi emis poste sidiĝi ĉe bufeda tablo kaj ekbabili kun nova konato aŭ malnova amiko, antaŭ ol forkuri al plia rendevuo. Kaj tre ofte ĝi simple forlasis la kongresejon kaj ekvagis tra la urbo, en triopoj aŭ kvaropoj, ĉiu el malsama kontinento, parolante, ridante, kantante en la lingvo, kies nomo parolas pri espero.

Jen la kerno de la sukceso de Varsovio. Esperanto ja ne estas propraĵo de iu organizaĵo aŭ grupo, kiel diris d-ro

Zaleski-Zamenhof en la Inaŭguro. La kongresaj organizantoj zorgas pri digna kadro; la cetero apartenas al la kongresanoj mem. Kaj ili scias sukcesigi ĝin.

Kultura kongreso, popola kongreso. Kaj ankaŭ — malgraŭ miloj da interaj kilometroj — afrika kongreso. Ne temas nur pri la unua Premio Deguĉi. Dek kvin el tiuj 73 landoj reprezentis la "nigran kontinenton", per juna, vigla delegitaro kiu alportis sian propran etoson al la tuto.

Pola kongreso. Kongreso de unu el la plej grandaj landaj Esperanto-movadoj en la mondo. Kongreso en la hejmlando de Zamenhof, fama pro sia gastamo. Tiu konto ne enhavas nur pozitivajn registrojn, ĉar ankoraŭ en Pollando ne plene enradikiĝis la teknika flanko de gastamo... Sed bilanco, kiu enhavas la plej entuziasman, subteneman, laboreman Altan Protektanton en iu ajn el niaj kongresoj, jam definitive saldas pozitive.

Finfine — por reveni al jam uzita vorto — ĥaosa kongreso. Pri tio verŝajne neniu surpriziĝis, kiu jam spertis unu el la grandaj UKoj. Fakte la surprizo, kiun oni ofte aŭdis en Varsovio, temis pri la relative glata funkciado de la tuta programo. Nur kelkaj ĝenaĵoj atestis pri la postsce- neja paniko. I.a. la pola turisma agentejo Orbis tre malděkivate alfrontis sian taskaron; la giĉetoj spertis kelkajn krizojn, kiel malaperon de insignoj kaj Kongresaj Libro; la Infana Kongreseto estis skandale misplanita... Verŝajne ĉiuj havas kritikojn grandajn aŭ malgrandajn. Sed ĉio finfine solviĝis, mirakle, pene, malgraŭe; jen dank' al LKK, jen dank' al la kongresanoj mem. Varsovio sukcesis kiel festo, sed pli grave, ĝi sukcesis kiel manifestacio... pri la viglo kaj vivanteco de nia centjara movado.

Historia, impona, tutmonda

Per bela koincido de historia hazardo kaj organiza oportuno, la Solena Inaŭguro de la 72a Universala Kongreso de Esperanto, la 26an de julio 1987 en Varsovio, interpontis la unuan kaj duan jarcentojn de la zamenhofa lingvo. En tiu fora somera posttagmezo de 1887, la juna Ludoviko verŝajne ne multe pensis pri centjaraj festoj, pri giĉetoj inunditaj de ses mil kongresanoj, pri longaj vicoj de diplomatoj kaj landaj reprezentantoj, pri inaŭguro kiu okazos dufoje pro "nur" trimilseĝa salonego. Eble feliĉe. Sed tiu dimanĉa tago en Varsovio, cent jarojn poste, ja apartenis al li — kaj la du Inaŭguroj formis iun simbolan, efemeran monumenton al tiu modesta homo, kiu heredigis sian genian projekton al la tuta homaro.

En la kongresa salonego, ornamita per polaj ruĝu kaj blanko, regis etoso samtempe solena kaj ekscitoplena. Televidaj kameraoj, ĵurnalistoj kun aŭ sen fotiloj, magneto-fone ekipitaj radioraportistoj svarmis en ĉiuj trapasejoj. Finfine enmarŝis la spaliroj de diplomatoj kaj landaj reprezentantoj, surscenejiĝis — fanfare akompanate — la longa vico de podianoj, kaj la atento de ĉiuj tri mil ĉeestantoj fiksiĝis je la inaŭguraj vortoj de d-ro Humphrey Tonkin, Prezidanto de UEA.

"Karaj gekolegoj!


"Bonvenon al la 72a Universala Kongreso de Esperanto! Bonvenon al Varsovio! Bonvenon al la dua jarcento de la Internacia Lingvo!

"Ni kunvenas tie ĉi en la lulilo de Esperanto, en la urbo, kie ekestis nia lingvo, kaj en la lando, kie naskiĝis ĝia kreinto. Tiu ĉi estos festa kongreso, en kiu ni honoros cent jarojn de nia historio kaj prepariĝos por la venonta jarcento. Neniam antaŭe tiom da homoj, el tiom da landoj, ĉeestis iun ajn Esperanto-renkontiĝon... La kongreso simbolas la progreson de Esperanto en la mondo. Ĝi estas pli tutmonda, ĝi estas pli internacia, ĝi estas kulture pli riĉa ol iam ajn antaŭe. Ni staras ĉi-momente fieraj pro nia centjariĝo; fieraj pro la cent jaroj de hardiĝo tra kiuj pasis Esperanto; kaj ni estas fortaj por fronti la estontecon!"

Tonkin daŭrigis sian enkondukon per prezento de la longa vico de podianoj: la estraranoj kaj ĝenerala direktoro de UEA, la prezidantoj de TEJO, Pola Esperanto-Asocio kaj LKK, reprezentanto de Unuiĝintaj Nacioj Nigel Cassar, rektoro de la Internacia Kongresa Universitato Juan Régulo Pérez, prezidanto de Esperanto-Propaganda Asocio de Oomoto Kyotaro Deguĉi, kaj — en tradukistaj roloj — John Wells kaj Andrzej Pettyn. Speciale varman aplaŭdon elvokis la ĉeesto de d-ro Ludoviko Zaleski-Zamenhof, nepo de la iniciatinto de Esperanto.

Laste Tonkin turnis sin al la Alta Protektanto de la 72a Universala Kongreso, prezidanto de la pola parlamento s-ro Roman Malinowski, kaj post mallonga sed sincera bonvenigo transdonis al li la mikrofonon. En rara ekzemplo de modesteco kaj sentemo, Malinowski elektis nek legi sian tutan paroladon en la pola, nek riski ĝin fari en Esperanto malpli ol perfekta; li do, post enkonduka saluto, transdonis la taskon al Andrzej Pettyn (kiu dum la tuta se-

majno ludos perfekte la rolon de pola interpretisto). El la vortoj de Malinowski (fragmente aperigitaj en la suba teksto), eksterordinara estis lia anonco pri la projekto de Esperanto-Centro en Bjalistoko, iniciato kiun li mem elkovis kaj antaŭenigas. La Centro iel simbolas lian propran kaptiĝon je la idealo de Esperanto: "movado, kiu fariĝis ankaŭ la mia". Longa entuziasma aplaŭdado sekvis liajn



PAROLADO DE LA ALTA PROTEKTANTO

Estimata Prezidanto! Estimataj Gesinjoroj!...

Kiom proksimaj estas al ni — en la hodiaŭa tempo, tempo plena de konfliktoj kaj diversaj minacoj por la homaro kaj por la vivo sur nia planedo — la celoj kaj idealoj, kiuj antaŭ cent jaroj gvidis la modestan okulkuraciston, kiam li proponis al la homaro sian internacian lingvon. Proksimaj kaj plu aktualaj, ĉar ni estas atestantoj de la freneza vet-armiĝado, atestantoj de la kreiĝado de ĉiam pli danĝeraj armiloj kaj kreskanta ekologia minaco, de la sentebla manko de fido kaj eblo interkompreniĝi inter homoj kaj nacioj.

Pollando, tiom dolorige suferigita en sia historio, Pollando, en kiu ĉiu kvara-kvina civitano pereis dum la dua mondmilito, havas tute specialan moralan rajton kaj devon paroli pri tiuj danĝeroj, alvoki al la batalo por konservado de la paco kaj kontraŭstari tiujn fortojn, kiuj kondukas la mondon al neniigo. Pro tio ĝuste en nia lando naskiĝis la bone konataj en la mondo paciniciatoj kaj proponoj pri senarmiĝo...


Hodiaŭ jam ne sufiĉas paca kunekzistado, hodiaŭ necesas dialogo kaj aktiva kunlaboro, pro la kreskanta kundenpendeco de la evoluo kaj la glob-skaliĝo de problemoj. Mi parolas pri ĉi tiuj dolorigaj demandoj de nia mondo,

lastajn frazojn, kiujn li mem legis en Esperanto.

Repreninte la mikrofonon, Tonkin dankis Malinowski pro liaj vortoj, sed "eĉ pli pro liaj faroj... Ĉar tio, kion li prezentas al ni, estas propono, kiu povus kvazaŭ fundamente nian venontan jarcenton, monumento al la fondinto de Esperanto sed samtempe ankaŭ utila kaj utiligebla centro por helpi la disvastigon de la Esperanto-kulturo... Ni esperas, ke ni havos okazon detale diskuti ĉi tiun proponon kun la kongreso kaj kongresanoj, kun la membroj de UEA kaj la Esperanto-movado ĝenerale. Ne temas ĉi tie pri centro kvazaŭ jam trapensita flanke de neesperantistoj, sed pri centro kiun ni povas plani, tiel ke ĝi helpu kiel eble plej bone servi al la bezonoj de la esperantistoj,

de UEA, de la Esperanto-movado." (Niaj legantoj do trovos sur p.164 resumon pri la nuna stato de la centro kaj alvokon por reagoj kaj proponoj.)

Tonkin tiam pluiris al plia simbola ero de la programo: la prezento de la familianoj de Zamenhof, kiuj honoris la kongreson per sia ĉeesto. Inter ili troviĝis d-rino Olga Zamenhof (bofilino de Felikso; Londono), s-ino Juliette Zaleski-Zamenhof (bofilino de Adamo; Parizo), kaj la familio Rytenberg, Eŭgeno, Kjersti kaj Jan (ligitaj per du geedziĝoj al la familio Zamenhof; Uppsala, Svedio). S-ino Maryla Szper (filino de Felikso; Parizo) kaj d-ro Steven Zamenhof (filo de Henriko; Usono) sendis siajn bedaŭrojn, ke ili ne povos persone ĉeesti.



De maldekstre: la Alta Protektanto Roman Malinowski; kvin ĉeestantaj membroj de la familio Zamenhof aŭskultas de supra balkono; vico de la podianoj aplaŭdas; d-ro Ludoviko Zaleski-Zamenhof salutas la kongreson.

ĉar mi konscias pri tio, ke por solvi ilin necesas interkompreniĝo, kaj ĉi tiun interkompreniĝon en la tuthomara skalo klopodas servi la lingvo Esperanto... Tio ĉiam estas la vivanta ideo-testamento de Ludoviko Zamenhof, kiu, krom krei la lingvon, kreis ankaŭ humanisman programon, konatan kiel esperantismo, programon, kiu celas —

"Via movado fariĝis ankaŭ la mia"

surbaze de komuna lingvo — konstrui la fidon kaj fratecon inter la nacioj. Pro tio estas afero tute komprenebla, ke la paco estas samtempe vorto kaj celo precipe proksima al la esperantistoj, kiuj konscias pri tio, ke nur en la kondiĉoj de la paco la Esperanto-movado povas ekzisti kaj evolui, kaj la lingvo — praktike servi la homaron.

En la centjara jubileo de Esperanto, vi kongresas en Pollando, ne nur por sumigi la ĝisnunajn atingojn de via movado, fiksi planojn por la estonteco, sed ankaŭ por omaĝi la grandan homon — Ludoviko Zamenhof — kiun Unuiĝintaj Nacioj nomis "filo de la tuta homaro".

La omaĝon kaj memoron plej ofte esprimas monumentoj; da tiuj Zamenhof havas en la mondo jam multe. Sed la vivo instruas, ke plej belaj, plej valoraj estas tiuj monu-

mentoj, kiuj praktike, ĉiutage servas la homojn. Mi estas profunde konvinkita, ke tia firma monumento, utila monumento, kiun okaze de la 100-jariĝo de Esperanto oni povas kaj oni devas starigi, en lia naskiĝurbo, devus fariĝi: **la Monda Esperanto-Centro Ludoviko Zamenhof en Bjalistoko**. Ĝi estus en sia formo monumenteca, sed ankaŭ praktike servus la esperantistojn en la tuta mondo kiel loko de renkontiĝoj, sciencaj esploroj — precipe interlingvistikaj kaj esperantologiaj, kiel loko de la praktika realigado de la ideo, al kiu oferis sian tutan vivon la kreinto de Esperanto!

Mia ĝojo estas tiom pli granda, ke oni konfidis al mi la honoron gvidi la laboron de la internacia konstru-fondaĵo de la Centro. Mi esprimas mian profundan esperon, ke ĉi tiu ideo trovos la subtenon de la partoprenantoj de la Varsovia Kongreso, ke per la kunlaboro de ĉiuj, al kiuj estas proksimaj la ideoj de Ludoviko Zamenhof, eble jam en baldaŭa estonteco prosperos al ni efektiviĝi la projekton de la konstruado de la Centro...

Al via Esperanto-movado, kiu fariĝis ankaŭ la mia, mi deziras sukcesojn en la nomo de la por ni ĉiuj komunaj celoj: interkompreniĝo, amikeco kaj kunlaboro, venko de la ideo de firma paco sur la Tero!

Tiam ekstaris kaj paŝis al la mikrofono d-ro Zaleski-Zamenhof por saluti la kongreson nome de sia familio.

"S-ro Alta Protektanto, s-ro prezidanto, gesinjoroj kongresanoj!

"En la nomo de la familio Zamenhof, disvastigita tra la mondo, mi salutas la kongreson; kaj mi deziras al vi ĉiuj plene sukcesi en viaj grandanimaj taskoj."

"Tiu kelkaj simplaj vortoj ege kortuŝas min... Precize antaŭ kvindek jaroj mi eldiris tiujn vortojn, salutante la Esperanto-kongreson tie ĉi en Varsovio, en 1937. Mia filino Hannah ripetis ilin en 1959, kiel kvinjara knabino, en tiu ĉi loko. Ĉi-foje mi rediras tiujn vortojn ankaŭ por ŝi, kaj por mia dua filino Margareto, fortenuita per profesiaj taskoj.

"Tamen Esperanto ja ne estas iu familia afero, kvan-kam estis tempoj, kiam miaj familianoj estis persekutataj pro Esperanto. Mia patro Adam, malliberigita en tiu ĉi urbo en 1939 en sia kvalito de la filo de d-ro Zamenhof, pereis tri monatojn poste. Mi salutas lian memoron. Mi salutas ankaŭ la memoron de Lidia kaj Sofia, kiuj pereis en Treblinka du jarojn pli malfrue.

"Sed mi akcentu ankoraŭfoje, ke Esperanto estas afero nek de familio, nek de iu klubo, nek de grupo, nek de nacio, nek de ŝtato, nek de religio. Plue, la Lingvo Internacia



UNIKA OKAZO
90-minutaj redaktitaj sonbendoj de la Inaŭguro haveblas de la Libroservo de UEA (prezo 13,50 gld.).

Sekretario de Unuiĝintaj Nacioj, por prezenti sian saluton al la kongreso. Ĉar ĉi tie ni parolas al kaj por esperantistoj, ni povas malkaŝi ke Cassar iom troigis per la longo de sia parolado, eble pro nekaŭkulo de la tempo necesa por tradukado (aplombe farita de John Wells). Cetere apenaŭ necesas memorigi nin ke, ekzemple, Esperanto "trovas siajn originojn plejparte en latinaj, grekaj, ĝermanaj kaj aliaj fontoj". Ni do ne trudos al la legantoj pli ol kelkajn partetojn de lia parolado...

"Mi volas diri, ke estas granda honoro havi ĉi tiun okazon renkonti vin, kaj mi volas transdoni la varmajn bondezirojn de la Ĝenerala Sekretario kaj ankaŭ lian bedaŭron, ke li ne povas mem ĉeesti ĉi tiun kongreson.

"En la kadro de la internacia komunumo, ni — Unuiĝintaj Nacioj — strebas konservi la pacon, limigante la nivelon de la armiloj, ni strebas provizi manĝaĵojn kaj vestaĵojn por ĉiuj popoloj de la mondo; ni volas vidi la forigon de malsato, malsano, nescio, mizero kaj malriĉo. Multaj el tiuj celoj estas atingeblaj: ili postulas konsiderindajn fortostreĉojn, sed ili estas atingeblaj...

"La forigo de konflikto, kiel same ja de la kaŭzoj de konflikto, estas la superreganta zorgo kaj respondeco de la Membroj-Ŝtatoj pro tio, ke ili estas unuiĝintaj en Unuiĝintaj Nacioj. Ankaŭ vi, kiel membroj de Universala Esperanto-Asocio, estas unuiĝintaj kune. Vi kunvenis el ĉiuj partoj de la mondo, kaj vi parolas ĉiuj la saman lingvon. Vi povas fari multon por antaŭenigi la pacon.

"Estas taŭga omaĝo al la memoro kaj la genio de d-ro Zamenhof, ke — post cent jaroj da uzado — troviĝas tiom da interesiĝo pri la uzo de Esperanto. Estas ankaŭ tre taŭge, ke ni estas ĉi tie en Pollando por festi tiun okazon. En la nomo de la Ĝenerala Sekretario, mi volas diri, ke ni aprezas vian entuziasmon en la antaŭenigo de paco kaj kompreno en la mondo, kaj ni tutkore subtenas vin en tiu celo."

Per sia tutsemajna ĉeesto kaj observado de la kongreso — poste konkretigota en raporto — Cassar donis iom da substanco al tiuj belaj vortoj. Ŝajnas, ke ankaŭ ĉe UN la Jubileo havis ian pozitivan efikon, ĉar ni ne memoras simile seriozan atenton en iu ajn antaŭa kongreso. Sed kompreneble, kiel antaŭaj spertoj ĉe UN jam pruvis, longas la vojo de raporto ĝis agado!

La diplomatan sekcion de la programo daŭrigis la prezento de la ambasadejanoj. Ĉeestis, antaŭ- aŭ posttagmeze, reprezentantoj de Aŭstralio, Aŭstrio, Belgio, Brazilo,

Laŭhorloĝe, de m.d.: Salutas la kongreson: prezidanto de PEA Roman Dobrzyński; UN-reprezentanto Nigel Cassar (dekstre) kaj tradukanto John Wells; TEJO-prezidanto Jan Koszmaluk; Jean-Marie Mboge Mbele (Kamerunio).

TELEGRAMO DE LA ĜENERALA SEKRETARIO DE UNESKO

Dankon, ke vi invitis min partopreni ĉi tiun historian 72an Universalan Kongreson de Esperanto en Varsovio, kaj mi sincere bedaŭras ke mi ne povas ĉeesti.

Esperanto konstante pruvis sian valoron kiel bonega perilo de interkompreniĝo inter popoloj kaj kulturoj, kaj grave kontribuas al paco en la mondo. Mianome kaj nome de Unesko mi deziras al vi ĉiun sukceson por la kongreso kaj esprimas mian esperon, ke multaj homoj en la mondo kiuj sin dediĉas al la evoluiĝo de ĉi tiu lingvo povos daŭre rikolti la frukton de siaj admirindaj strebadoj.

Unesko restas preta provizi helpon ene de siaj disponeblaj rimedoj kaj ripetos sian apogon por la celoj, kiuj inspiris doktoron Zamenhof krei Esperanton kaj kiuj estas paralelaj al la fonda spirito de Unesko. Bondezirojn —

Amadou Mahdar M' Bow.

ne estas celo por si mem; ĝi devas esti instrumento de la granda, filozofa, homarana koncepto de la kreinto, aŭ — ni diru — iniciatinto de la lingvo, kiel d-ro Zamenhof preferis nomi ĝi."

En sia mallonga parolado, d-ro Zaleski-Zamenhof plu emfazis la profundan rolon de Esperanto kaj ĝian aktualecon en mondo, kie "la iamaj simptomoj de la homa malsano, ĉiam latentaj, vekiĝas de tempo al tempo. La 'glavo sangon soifanta' ŝajnas ankoraŭ minaci nian terglobon." Evidente kortuŝita, la esperantista publiko longe salutis liajn vortojn per emocia aplaŭdado.

Post muzika paŭzo de perfekta longo kaj etoso, plenumita de varsovia kordkvaropo, Tonkin petis al la mikrofono s-ron Nigel Cassar, la reprezentanton de la Ĝenerala

Bulgario, Ĉinio, Ĉeĥoslovakio, Danlando, Finnlando, Francio, Germana DR, Hispanio, Hungario, Israelo, Italio, Japanio, Jugoslavio, Kanado, Kubo, Meksikio, Pakistano, Svislando, Usono kaj Zairio. El ili modelis la saluto de la israela reprezentanto, s-ro Mordechai Palzur, kiu mallonge en perfekta Esperanto esprimis sian ĝojon, ke Zamenhof, samtempe pollandano kaj hebreo, tamen kreis lingvon por la tuta homaro.


Sekvis eble la plej imponaj kaj inspiraj momentoj de la Inaŭguro, kiam bildiĝis pere de la esperantistoj la unika tutmondeco de ĉi tiu jubilea solenaĵo. Al la mikrofono venis sinsekve Jan Koszmaluk, la novelektita prezidanto de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo; Roman Dobrzyński, prezidanto de Pola Esperanto-Asocio; Staniław Świstak, prezidanto de la Loka Kongresa Komitato; kaj salutantoj el trideko da landoj (ĉar la sepdek kongresajn landojn oni dividis inter la matena kaj posttagmeza Inaŭguroj). En kalejdoskop sinsekvo parolis homoj el ĉiuj kontinentoj, el ĉiuj mondopartoj, plejparte per simpla kaj sincera frazo kiu kvazaŭ rolis kiel tiu "lingva manpremo" karakteriza por la Internacia Lingvo. Aparte varme oni bonvenigis la afrikajn kongresanojn kaj aliajn reprezentantojn de triamondaj landoj, eble rekonante la grandajn malfacilojn, kiujn ili devis venki por ĉeesti. La finan bukedon portis la 31 partoprenantoj de la Infana Kongreseto, kiuj eltenis sian 90-minutan atendadon per rimarkinda bonhumoro kaj pacienco pri la parolemo de la plenkreskuloj.

Vicprezidanto de UEA Yosimi Umeda akaparis la mikrofonon por mallonge prezenti du gravajn donacojn al

UEA, kies rezultojn oni plene vidos nur en postaj jaroj. Temas pri la fondo de Premio Onisaburo Deguĉi, dank' al donaco de Esperanto-Propaganda Asocio de Oomoto, kun la celo honori agadon kreskigi interhoman kaj interpopolan solidarecon pere de Esperanto; kaj pri la donaco, fare de japana esperantisto, de grandega monsumo cele al la antaŭenigo de la movado en Azio. Pri tiu iniciato ni raportos en postaj numeroj de la revuo, ekde la aŭgustofina Azia Konferenco de UEA; kaj raporton pri la Premio Deguĉi vi trovos en ĉi tiu numero sub "Tago de la Paco".

La ĝenerala sekretario de UEA, d-rino Flora Szabó-Felső, prezentis resumon de la skribaj salutoj al la kongreso. La direktoro de Unesko, s-ro A.M. M'Bow, denove telegramis persone (vd. apartan tekston), kiel ankaŭ la Prezidanto de Islando, s-ino Finnbogadottir. Ingemund Bengtsson, prezidanto de la sveda parlamento kaj membro de la Honora Patrona Komitato de UEA, letere esprimis sian bedaŭron pri neĉeesto. La prezidanto de UEA mem laŭtlegis telegraman saluton de la Jubilea Esperanto-Konferenco en Graz (Aŭstrio), en kiu prof. Ivo Lapenna kaj d-ro Klaus Perko reciprokis la jaman saluton de UEA.

Kulminon kaj finon de ĉi tiu jarcento-transponta ceremonio markis la festparolado de Humphrey Tonkin, kiun vi povos grandparte legi alipaĝe. Jam antaŭ la formorto de la aplaŭdoj, la Prezidanto de UEA signis la komencon de la Himno, kaj trimilvoĉa kunkantado metis belan tradician sigelon al la inaŭguraj solenaĵoj. Almenaŭ por la spektantaro: ĉar la sindediĉaj podianoj kiuj ĉeestis matene jam frontis la neceson reveni post du horoj por "fin-inaŭguri" ĉi tiun rekordan Jubilean Kongreson de Esperanto.



Bjalistoko: Manifestacio por interhoma solidareco

Pli ol mil kongresanoj dediĉis sian ekskursotagon, la 29an de julio, al pilgrimiro al la naskiĝurbo de Zamenhof. En la eta parko en la urbocentro, kie staras bronza monumento al la iniciatinto de Esperanto, densa homamaso ĉeestis la subskriban ceremonion de la Fondo-Akto por la Bjalistoka Esperanto-Centro. Kaj poste, en subĉiela amfiteatro, okazis ceremonio dediĉita al la idealoj, kiuj inspiris tiun grandan humaniston dum lia tuta vivo.

Post enkondukaj vortoj kaj prezentoj, i.a. de la ĉeestantaj pola vicministro pri kulturo kaj la vojevodo kaj urbestro de Bjalistoko, parolado de d-ro Ludoviko Zaleski-Zamenhof bele difinis la idean enhavon de la programo. Parolante en la pola, kiun li ankoraŭ perfekte konas de sia infanaĝo, li substrekiis la ligitecon de paco kun fundamentaj homaj rajtoj en la vasta homarana vizio de sia avo; kaj parolis kun espero pri la ŝanĝo en Bjalistoko mem, kie "anstataŭ ĉiuj doloraj kaŭzoj de malamo, kiujn li konis kaj kiuj inspiris lian humanismon, li trovis



modernan urbon kie la homoj vivas en paco kaj interhoma solidareco".

La prezidanto de UEA, Humphrey Tonkin, poste enkondukis la manifeston konotan kiel la Deklaron de Bjalistoko. Li parolis pri la survoja vizito de la esperantistoj al Treblinka, kie pereis centoj da miloj da homoj en la dummilita koncentrejo, kaj la ĉeno de kaŭzoj kondukanta de senscio tra timo kaj kruelo ĝis mortigado. "Dum cent jaroj esperantistoj laboris por rompi tiun ĉenon, sed ankoraŭ estas nur komenco. Pro tio, ke Esperanto ne sukcesis, homoj ankoraŭ mortas pro la samaj kialoj." Sekve la Alta Protektanto Roman Malinowski esprimis la esperon, ke la planata Bjalistoka Centro "servos al la forigo de la internacia analfabetismo" en interhomaj rilatoj.

La Deklaro, aperigita sube, estis poste adoptita de la tuta Kongreso en la Solena Fermo. UEA prizorgas ĝian dissendon al registaroj k.s., sed ĝi ankaŭ indas je diskonigo inter aliaj porpacaj kaj humanismaj movadoj.

DEKLARO DE BJALISTOKO

El la urbo Bjalistoko, naskiĝloko de la kreinto de Esperanto, Ludoviko Zamenhof, unu el la grandaj humanistaj figuroj de nia epoko, la partoprenantoj en la 72-a Universala Kongreso de Esperanto sendas tiun ĉi deklaron al la ŝtatestroj kaj registaroj de la mondo okaze de la Centjara Jubileo de la Internacia Lingvo.

1/ Unu el la plej grandaj kaŭzoj de malamikeco inter la diversaj landoj de la mondo estas manko de scio. Tiuj, kiuj ne konas unu la alian, facile fariĝas viktimoj de antaŭjuĝoj kaj miskomprenoj.

2/ Kvankam la edukaj sistemoj de la diversaj landoj povas multon fari por kulturi en la mensoj de siaj lernantoj informitecon kaj malfermitecon al aliaj popoloj, ankoraŭ pli valoraj ol abstraktaj lecionoj estas rektaj kontaktoj.

3/ Kvankam la gazetaro kaj aliaj komunikiloj povas helpi ĉiujn civitanojn informiĝi pri aliaj popoloj, senpera komunikado inter homoj el diversaj landoj estas la plej bona maniero forigi antaŭjuĝojn kaj firmigi la kompreniĝon.

4/ La senpera kontakto postulas komunan lingvon. Se homoj parolas malsamajn lingvojn, ili ne povas senpere komunikiĝi. Kvankam lernado de aliaj naciaj lingvoj estas valora maniero transponti tiun dividon, la internacia lingvo Esperanto konsistigas aparte facilan kaj efikan metodon por atingi internacian interkompreniĝon je tutmonda skalo kaj ĝi estas plej bona enkondukilo al la lingvolernado.

5/ Esperanto — pro sia simpleco, logiko kaj tuta strukturo — estas ne nur lingvo taŭga por ĝenerala lernado, kiel la dua lingvo por ĉiuj, sed tra cent jaroj da utiligo en ĉiuj sferoj de la homa vivo, ĝi fariĝis plene esprimiva kaj fleksebla kaj ĝiaj parolantoj troviĝas en preskaŭ ĉiuj landoj de la mondo.

6/ La mondaj problemoj, kiuj bezonas pritrakton je tutmonda skalo, ĉiam plimultiĝas. La demandoj de ekonomia evoluigo, de malarmado, de malsato, de malsano, de analfabeteco, de mediprotektado, k.s. postulas komunan kaj egalecan aliron pere de rekta komunikado en komuna lingvo. Regado kaj solvado de tiuj problemoj povas efike okazi nur per plena partopreno de civitanoj je ĉiuj niveloj.

7/ Tial ni rekomendas al ŝtatestroj, registaroj kaj kompetentaj aŭtoritatoj kaj instancoj de ĉiuj landoj utiligi Esperanton kiel studobjekton en lernejoj kaj ebligi rektajn homajn interŝanĝojn inter siaj ŝtatanoj kaj homoj el aliaj landoj pere de la Internacia Lingvo.

8/ Ni firme kredas, ke el tiu rekta interŝanĝo ekestos pli klara interkompreniĝo inter unuopaj homoj de ĉiuj landoj. Tio kondukos al redukto de streĉiteco, al pli granda malfermiteco inter la popoloj, kaj al pli paca kaj libera mondo.

Ni invitas ĉiujn homojn de bona volo, kiuj konsentas kun tiuj ĉi principoj, apogi tiun ĉi Deklaron kaj tiel sin dediĉi al antaŭenigo de interkompreniĝo inter ĉiuj homoj de la mondo.

Bjalistoko, la 29-an de julio 1987.

Venas nun la periodo de disvastigo

Karaj Gekolegoj!

Antaŭ cent jaroj, ĝuste en la hodiaŭa tago, en presejo apud nia nuna kongresejo, aperis malgranda libro. Ĝi nomiĝis, en la rusa lingvo, "Lingvo Internacia". Ĝi priskribis simplan, bazan projekton de lingvo por faciligi la internacian komunikadon. Ĝia aŭtoro kaŝis sin malantaŭ la nomo "Doktoro Esperanto".

Malmultaj estis la homoj, kiuj profetis korekte la estontecon de tiu libro. La presistoj, kiuj ĝin kompostis, kaj pasigis tra la presilo, apenaŭ povis scii, ke, cent jarojn post, kolektiĝos en Varsovio sesmil homoj el sepdeko da landoj por festi la finfaron de tiu simpla preseja tasko. Malmultaj

estis la homoj, eĉ inter tiuj, kiuj aĉetis la libron, kiuj povis ĝuste antaŭvidi, ke tiu eta kaj modesta broŝuro semos semon, kiu disbranĉiĝos en plenan kaj vivipovan lingvon, kiu etendiĝos en ĉiun angulon de la terglobo kaj estos uzata por ĉiuj taskoj, ĉiuj funkcioj, por kiuj la homaj lingvoj estas uzataj.

Malmultaj estis la homoj, kiuj povis profiti la grandajn ŝanĝojn, la grandajn eventojn, kiuj trafos la mondon en tiu jarcento de tiam ĝis hodiaŭ. Eble la spirito de optimismo de 1887 profetis la aviadilon, la televidon, la spacveturadon, la komputilon. Eble ĝi profetis la grandajn gajnojn kontraŭ malsano kaj malriĉo, kontraŭ alfabeteco, kontraŭ malsato, kiujn registris nia jarcento. Eble ĝi povus antaŭvidi la konsciiĝon pri la homaj rajtoj, pri la rajtoj de virinoj, pri la rajto al demokrata partopreno en la socio, kiuj en nia epoko estis kodigitaj en la Universalan Deklaracion de Homaj Rajtoj kaj aliajn dokumentojn.

Eble ĝi povus antaŭvidi la kreon de la Ligo de Nacioj kaj poste la fondon de Unuiĝintaj Nacioj, ĉar ja en tiu epoko la sopiro al supernaciaj organizaĵoj, kiuj helpu la naciojn vivi en paco, estis granda.

Sed ĉu tiuj legantoj de la Unua Libro, kaj tiuj laboristoj, kiuj ĝin presis, povus scii ke interne de tridek jaroj tuta Eŭropo plonĝos en la nokton de la plej granda milito, kiun iam ajn spertis la homaro? Ĉu ili imagus ke ĉiuj tiuj eltrovoj de la scienco kaj la tekniko, kiuj levos la vivnivelon de la homoj, faciligos al ili la ĉiutagan vivon, pligrandigos ilian vivosperton — ĉu ili imagus, ke ili ĉiuj havos ankaŭ sian malluman flankon, kaj ke la brila tekniko kiu

alportos vivon ankaŭ portos morton? La sensencan detruon de tiu unua mondmilito ni ŝuldas al la teknika progreso, per kiu unu nacio povis ĵeti kontraŭ alia armilojn neniam antaŭe eltrovitajn. Tiu brila progreso, kiun ili tiel admiris, detruis Dresden, detruis Coventry, kaj, en fina paroksismo de neniismo, detruis Hiroŝimon...

Kaj la tekniko, kiu faris la tankojn kaj la militaviadilojn, kiu faris la atombombojn kaj la militraketojn, estis tiu sama tekniko, kiu eltrovis novajn metodojn por persekuti la homojn pro la raso, al kiu ili apartenas, la religio, kiun ili kredas, la lingvo, kiun ili parolas. Temas pri la sama tekniko, kiu inventis la gasejojn kaj la fornojn, kiujn

neniu homo, tie ĉi en Varsovio kunvenanta por festi la centjariĝon de Esperanto, povas plene forgesi...

Kiam en 1917 Zamenhof mortis, Esperanto tamen vivis.

Ĝi vivis tra ĉiuj ŝtormoj, ĉiuj uraganoj — tra la skismo de Ido, tra la skuoj de la unua mondmilito, tra la korŝira malsukceso ĉe la Ligo de Nacioj, tra la persekutoj de la 30aj jaroj, tra la katastrofoj de la dua mondmilito. Ĝi vivis spite al antaŭjuĝoj, spite al superteraj reformoj, spite al organizaj fuŝoj, spite al ĵaluzoj kaj kvereloj...

Kaj ĝian historion, spite al la obstakloj, spite la renversojn, punktas belaj sukcesoj, kuraĝaj agoj. Ni memoras la tradukon de *Hamleto*, ni memoras Boulogne-sur-Mer, ni memoras la forajn pionirojn

— Grabowski, Kazimierz Bein, Privat, Hodler. Ni memoras tiujn, kiuj tra la unua mondmilito laboris pere de Esperanto por ligi parencojn trans la batalado de oponaj armeoj. Ni memoras Kalocsay kaj Baghy. Ni memoras Cseh. Ni memoras la sukcesojn en Montevideo kaj Sofio. Ni memoras la kongresojn en Tokio kaj Pekino... Se Zamenhof mortis, se herboj kreskas sur la ruinoj de iama Varsovio, Esperanto vivas kaj prosperas. Kaj se ni kaj niaj kolegoj maljuniĝas en nia kunlaboro, vivas forte la esperantoj. Ili ĉirkaŭas nin tie ĉi, kaj ili portas nian lingvon en la estontecon.

Kion alportos tiu dua jarcento al Esperanto? Same kiel la unuaj adeptoj de la lingvo de doktoro Esperanto, same kiel la laboristoj, kiuj presis tiun broŝureton, ni apenaŭ povas profeti. Unu afero estas tamen tute klara: la lingvo mem, kiu pasis tra la fandejo de cent jaroj de evoluo, brile



sukcesis. Neniu, kiu ĝin uzas, povas dubi, ĉu ĝi estas lingvo plena kaj kompleta. Neniu, kiu uzis ĝin en la scienco aŭ legis ĝian literaturon, povas tion diri — eĉ se necesas daŭre ĝin modernigi kaj ankoraŭ kompletigi. Sed se ĝi brile sukcesis kiel lingvo, ĝi ankoraŭ ne brile sukcesis kiel lingva komunumo — la plejparto de la homoj ankoraŭ ne parolas ĝin, eble eĉ nenion scias pri ĝi. Ni havis niajn sukcesojn tiurilate: jen okazis sukcesoj informkampanjaj aŭ instruagadaj, jen oni akiris oficialan rekonon, jen fakuloj serioze ĝin traktis. Sed la granda laboro restas antaŭ ni.

Ĝi estas ja giganta laboro. Ĝi estas nenio alia ol konvinki la homojn, ke Esperanto prezentas la plej bonan solvon al la lingvaj problemoj de la mondo. Ĝi tion faras ĉar ĝi estas facila kaj facile lernebla. Ĝi tion faras ĉar ĝi estas neŭtrala. Ĝi tion faras ĉar ĝi traktas ĉiujn homojn en spirito de egaleco. Neniu alia lingvo tion faras. Tiuj aliaj lingvoj prezentas pseŭdosolvojn, kiuj privilegias certajn homojn super aliaj kaj kiuj disvastigas certajn kulturajn valorojn kaj ne aliajn. Ili foje bele aspektas, ili foje aspektas

nehaltigeblaj, sed ili ne solvas la fundamentajn problemojn, kiujn Zamenhof celis solvi. Ja finfine lia lingvo estis kaj estas pli ol proponata solvo de la lingva problemo: ĝi estas provo alfronti la spiriton de malegalo, de netolero, de malamo, kiu tiel disŝiras nian belan mondon.

Multaj parolantoj de Esperanto ĝuas sian lingvon, kaj ĝin uzas, sen granda entuziasmo ĝin disvastigi. Al ili sufiĉas la kongresoj, ilia loka klubo, okazaj libroj aĉetitaj de la libroservo. Eĉ ĝenus ilian komfortan kaj hermetikan mondon subita alfluo de novaj lernantoj, novaj adeptoj. Ja per simpla utiligo de la lingvo ili helpas ĝian lingvan pliriĉigon. Sed, karaj gekolegoj, tio ne plu sufiĉas. Venas nun la periodo de disvastigo. Ni kreis murojn ĉirkaŭ ni: sekuraj en niaj kluboj kaj kongresoj, ni ne bonvenigas adekvate la novulojn, ni ne sufiĉe pledas por nia lingvo, ni ne alfrontas la publikon, ni ne agas sufiĉe discipline kaj celkonscie. Dirante tion, mi neniun akuzas, mi neniun kritikas. Mi simple faras tiun ĉi konstaton: ke la lingvo ekzistas unue por disvastigi, due por ĝui. Fojfoje ni inversigas tiun ordon, kaj forgesas nian veran celon.

Kiam Zamenhof kreis sian lingvon, li kaj liaj samtempuloj optimisme rigardis la estontecon. Ili opiniis problemojn solveblaj. Ili kredis je la progreso. La posta jarcento montris, ke ili pravis kaj ne pravis: ke altiĝis la intenseco de la sukcesoj kaj samtempe la intenseco de la malsukcesoj. Sed ni ne forgesu, ke, malgraŭ ĉio (kaj malgraŭ tio, ke la pliboniĝo ne estas universala), pliboniĝis la homa kondiĉo tra la pasintaj cent jaroj. Plivastiĝis la egaleco. Pligrandiĝis la demokratio. Necesas nun lerni la saman lingvon, por ke komune, solidare, en spirito de kompreniĝo, ni povu fronti kuraĝe la problemojn de la moderna mondo — laŭ la ekzemplo de Zamenhof kaj kun la sindediĉo, saĝeco kaj klarvido de realismaj esperantoj.

Humphrey Tonkin

Kongresa Konkurso de la Pola Radio

Granda stoko da premioj — kaj eventuale ankau publikigo en kongresa memorlibro — atendas kongresanojn kiuj respondos, laupove kaj laueme vaste, al la demandoj:

* **Kio kaj kiel plej multe impresis vin dum la 72a UK en Varsovio?**

* **Kiaj estas viaj ĝeneralaj impresoj pri la estado en Pollando okaze de la Jubilea Jaro?**

La respondojn oni sendu al Radio Polonia, Esperanto-redakcio, Kongresa Konkurso, Varsovio, Pollando — ĝis la 31a de decembro 1987.

DUA KONGRESA REZOLUCIO:

Disvastigi la uzadon de Esperanto

La 72a Universala Kongreso de Esperanto, okazante de la 25a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto 1987 en Varsovio kun 5946 kongresanoj el 73 landoj,

afirmante, ke la Internacia Lingvo Esperanto fariĝis plenmatura komunikilo, kiu estas la libera posedaĵo de ĉiuj popoloj de la mondo,

agnoskante la grandan kontribuon de sennombraj uzantoj de Esperanto dum tuta jarcento por transformi la lingvon en riĉan esprimilon de plej diversaj kulturoj, inkluzive la kulturon de la Esperanto-komunumo mem,

notante, ke la Ĝenerala Konferenco de Unesko rekonis la valoron de Esperanto per siaj resolucioj de 1954 kaj 1985,

alvokas la Esperanto-komunumon eniri sian duan jarcenton, sekvante la daŭre validan ekzemplon de Ludoviko Zamenhof, en spirito de paco, laboremo kaj espero,

instigas la Esperanto-organizaĵojn — landajn, fakajn kaj aliajn — elserĉi komunan grundon de kunla-

boro kaj pli intense interŝanĝi ideojn por antaŭenigi Esperanton,

apelacias al ĉiuj aktivuloj por Esperanto direkti sin al instruado kaj praktika aplikado de la lingvo,

emfazas la neceson pliprofesiigi la laboron por Esperanto sur ĉiuj terenoj, alprenante aktualajn metodojn, utiligante modernajn teknikilojn kaj pli efike mastrumante la disponeblajn homajn kaj financajn rimedojn,

atentigas, ke Esperanto estas parolata en ĉiuj partoj de la mondo kaj ke necesas adapti la organizan strukturon de la Esperanto-komunumo por plene speguli tiun tutmondecon,

plie atentigas pri la granda potencialo de Esperanto en la monda turismo kaj la bezono de pli multaj konkretaj agadoj sur tiu kampo,

forte rekomendas, ke en sia ekstera agado la Esperanto-organizaĵoj emfazu la Unesko-rezolucion de 1985 kaj instigu la registarajn kaj neregistarajn organizaĵojn, al kiuj ĝi estas direktita, plenumi ĝiajn rekomendojn, kaj

substrekas, ke disvastigi la uzadon de Esperanto estas konstanta tasko de la Esperanto-komunumo sub la tegmenta gvidado de Universala Esperanto-Asocio.



ARTA PROGRAMO

Kongresa temo realiĝis pli praktike ol teorie

"Cent jaroj de internacia kulturo" — en ĉiu senco la kongresa temo traktiĝis dum la sep kongresaj tagoj. Mirinde bunta arta programo kaj ĉiuj tradiciaj UK-aranĝoj (ĉar ja kulturo ne temas nur pri belarto!) atentis pri la praktika flanko, dum diversaj konferencoj kaj kunsidoj donis lokon al la teoriemuloj. Pro tiu interrilitado, la kongreso — almenaŭ en retrorigardo — alprenis iom pli koheran aspekton ol kutime. Jen la kialo, ke anstataŭ distranĉi ĝin je diversaj unukoloraj pecoj, ni prezentos la programerojn jene kune, en iuspeca ĉielarko.

Dimanĉo: festa enkonduko

Dum la dua Inaŭguro komenciĝis interne de la kongresa salonego, la Interkona Posttagmezo ekis per kanto-, danco- kaj muzikgrupoj ekster la Palaco. Ĉi tiu eksperimenta programero, kiu eble restos unika je Varsovio, tute brile sukcesis en la kreo de festa etoso. Ĉu per polaj klasikaj (Chopin en la parko Łazienki), ĉu per vizitantaj artistoj el Bulgario, Sovetio k.a. (tre popularaj ĉe la ĉirkaŭsvarmantaj ĵurnalistoj), ĉu per junulara estradkoncerto en la Malnova Urbo (kies nivelo klare superis ĉiujn antaŭajn provojn), la kongresanoj povis distri sin kaj samtempe evidentigi la komunan kulturan rolon de Esperanto al la ekstera mondo.

Ankaŭ tre sukcesaj estis la Naciaj Artaj Vesperoj, kiuj okazis tiun saman tagon laŭ la ĝemelformulo de la Inaŭguroj. Reĝisoritaj de juna neesperantista scenejisto kaj lerte gviditaj de la frake vestita baritono Remigiusz Kossakowski, ili eltrovis por si lokon inter la plej bonaj tiuspecaj programeroj en iu ajn UK. Kelkaj brilaj steloj: la komenca kantado de *Preĝo sub la verda standardo*, kies dolĉa, malnovstila melodio sukcesis redoni la etoson de la pioniraj jaroj; la eminenta plenumo da tuta aro de arioj el la opero *Halka* de Moniuszko, aparte tiu de tenoro Jacek Parol (kiu sekvis la plej longa aplaŭdo de la vespero); kaj pluraj

muzikaj pecoj de la orkestro, ĥoro kaj dancistoj, inkluzive la neeviteblajn "polonezojn". Apartan gratulon — precipe en komparo kun la posta Internacia Vespero — meritas la lerta variigo kaj kungluo de la diversaj eroj.

Atendeble, ne ĉio estis same altkvalita. Ioman revtrompon mi mem ŝuldas al la pianisto kiu ludis Chopin: en Varsovio, el ĉiuj lokoj sur tero, oni atendus pli inspiritan plenumon (kaj eble alian elekton, ol la kliŝan "Brila Valco"). En poezia deklamado, la pola emo je patoso ne ĉiam ebliĝas facilan komprenon — la ĉarma poemo de Miłosz, "Nigra knabino ludas Ŝopenon" (t.e. Chopin), ne tiel suferis, sed longaj ĉerpaĵoj el *Sinjoro Tadeo* foje perdis la poezion kaj iĝis, laŭ mia gusto, bombastaj. Ĉu temas pri iu limigo je kultura "internacieco"?

Teatraĵoj: aro da omaĝoj, abundo da absurdo


Lerta enprogramigo metis la IKU-prelegon de Marjorie Boulton, "La Esperanta teatro", je la komenco de semajno eble senprecedence bunta en tiu artkampoj. Tuta dekkvino da teatraĵoj, plejparte realigitaj de profesiaj aŭ duonprofesiaj aktoroj, certigis la neblon ĉeesti ĉiujn. Kelkaj estis preparitaj speciale por la Jubilea Jaro, celantaj iel speguli la riĉecon de nia historio kaj kulturo. Tiaj estis, ekzemple, "Sopiro—laboro—espero" de profesia pola aktoro kaj esperantisto Jerzy Fornal, kiu per poemoj kaj eldiroj de Zamenhof celis krei ekvidon en liajn intimajn pensojn kaj vivfilozofion; "Omaĝo al nia majstro" de aktorino Urŝula Tupejka, kiu cetere provizis interesan komparon kun ŝia dua biografia monodramo, "Julio Baghy"; "Nia kara lingvo Esperanto" de Bulgara Esperanto-Teatro (BET), recita programo bazita sur la Esperanta

Supre: Unu el la plurnaciaj prezentoj en la Interkona Posttagmezo; tenoro Jacek Parol ravis la aŭskultantojn en la Nacia Arta Vespero.

literaturo; kaj la jam fama monodramo "Zamenhof" de Jadwiga Gibczyńska, kiu prezentas la iniciatinton de Esperanto el la vidpunktoj de liaj patrino, edzino kaj filino.

Ankaŭ prezentiĝis kelkaj klasikaj tradukitaj verkoj, kvankam neniu ja kuraĝis entrepreni ekz. Ŝekspiron aŭ Goeton... Fakte, rigardante la teatraĵaron de la 72a UK, oni konstatas netan preferon por relative mallongaj dramoj el la "teatro de la absurdo". Bulgara Esperanto-Teatro surscenejigis "Pikniko sur la batalkampoj" de Arrabal kaj "La kavernoj de Salamanka" de Cervantes, du hispanaj "intermezoj" kiuj kombinas humuron kun akra socia kritiko. La talentoj de la trupo eble pli taŭgis por la dua, ridiga farso pri sociaj moroj, ol por la dramo de Arrabal, kie absurdo kaj sombro postulas tre leĝeran reĝisoradon. Saman kritikon oni povus diri pri "Feliĉa evento" de Slawomir Mrożek, en la plenumo de Teatr Pow-

La drama spektro en Varsovio estis mirinde bunta. De maldekstre, pantomimistoj, pupteatristoj, ĥoristoj; kaj ĉe la fino, unu el la plej brilaj steloj — kanada kantistino Joëlle Rabu, kies Piaf-eca voĉo denove ĉarmis.



szechny: unuavide komika situacio kaŝas dentojn de tragedio, kies mordopretan ĉeeston oni devus senti eĉ meze de rido — sed en Varsovio oni eksentis tion nur subite ĉe la fino de la peco.

Kaj la pola trupo Verda Monto kaj la franca Krizalido sekvis en la sama ĝenro, per "Lulkanto" de Beckett, "Cikonioj" de Sikorski, "Serenado" de Mrożek, "Aminda kretenino" de Maurey. Al tiuj aldoniĝis brila monodrama adapto de la fama romano de Hašek, "La travivaĵoj de la brava soldato Ŝvejk", fare de pola aktoro Mirosław Henke. Ne eblas trakti ĉi tie eĉ unu el tiuj prezentoj laŭmerite, sed eventuale ni komentu, ke la elekto ne ĉiam ŝajnas taŭga por kongresa spektantaro... Nepre bonveniginda estis la reveno de Vida Jerman en la originala Esperanta dramo de Spomenka Štimec, "Virino, kiu flustris en uragano", pri la vivo de Verda Majo; mi bedaŭras, fakte, ke ne prezentiĝis pli da eroj el nia propra drama tradicio.

Pupteatroj ne forrestis: la konata pola trupo Rabcio prezentis "Kion mi diros, tion mi diros", sprita interpreto de malpudoraj popolaj rakontoj, kaj por infanoj sian version de la klasika "Ruĝa ĉapeto". La bulgara Ŝtata Pup-teatro Vraca premieris en Universala Kongreso per "La

TRIA KONGRESA REZOLUCIO:

Diskoni

La 72a Universala Kongreso de Esperanto, okazante en Varsovio de la 25a de julio ĝis la 1a de aŭgusto 1987 kun 5946 kongresanoj el 73 landoj, kaj kun la temo "Esperanto — 100 jaroj de internacia kulturo",

notante, ke la Internacia Lingvo Esperanto, el sia modesta komenciĝo en Varsovio en 1887, transformiĝis en lingvan komunumon kun parolantoj en ĉiuj regionoj de la mondo;

rimarkigante, ke dum sia viva jarcento Esperanto faris gravan kontribuon kiel peranto de kulturaj valoroj inter la popoloj kaj subtenanto de reciproka respekto kaj interkompreniĝo inter la diversaj kulturoj de la mondo;

atentigante pri ĝia kontribuo al la antaŭenigo de la scienco kaj tekniko je internacia nivelo;

konsiderante ankaŭ ĝian grandan originalan literaturon, ĝian gazetaron, ĝiajn radio-programojn, kaj ĉiujn aliajn kulturajn agadojn de la Esperanto-movado;

agnoskante la kreskantan atenton, kiun Esperanto ricevas

ovo", en kiu imponis la sceneja aranĝo kaj tre belaj pupoj, sed malpli la teatraĵo mem, kiu tro longis por la magra enhavo. Por komencantoj prenkreskulaj, eblis spekti la Varsovian Teatron de Pantomimo en "Maratono", senvorta prezento de ĉiamaj homaj dilemoj tra epizodoj el antikva Greklando. Lingvo ne nepras por komuniki internacie...

Aldona kaj nepre menciinda ero estis la treege sukcesa forumo por amatoroj, "Amatoroj sin prezentas". La enprograma loko montriĝis tute ne sufiĉa por la interesiĝantoj, kaj oni translokis la tuton al teatro por 500 personoj. Estas ja kuraĝige, ke tiom da esperantistoj pretas aktive partopreni en kultura kreado!

Filmoj: kongresa oazo post senakvaj jaroj

Esperantistaj filmamantoj devas ofte senti sian lingvon senfonta dezerto. Apenaŭa manpleno de filmoj aperis en ĝi ĝis nun, kaj *Esperanto en perspektivo* nomas nian kinoarton "neplugita kampo". Sed en Varsovio, oni povus diri, ekiris la plugilo: du elstare vidindaj filmoj premieris tie kaj prezentiĝis pluraj aliaj, kvankam de malpli granda arta valoro. Pri *En Eŭropo ie* ni skribas aliloke (vidu "Tago de la Paco" kaj la oktobran numeron). Apud tiu hungara

oni gi kaj plifortigi niajn kulturajn atingojn

en universitatoj kaj esplorinstitutoj tra la mondo;

emfazas, ke Esperanto plene evoluos nur per konstanta plialtigo de la lingva nivelo de ĝiaj parolantoj kaj daŭra uziĝo en ĉiuj vivosferoj;

atentigas pri la neceso pli intense konigi la Esperanto-kulturon inter ne-parolantoj de Esperanto;

alvokas al pli intensaj klopodoj normigi kaj larĝigi la fakan terminaron de Esperanto, tiel ke ĝi plej efike kontentigu la bezonojn de la internacia scienco kaj tekniko;

rekomendas al ĉiuj edukaj kaj sciencaj institucioj, kulturaj instancoj, bibliotekoj, informcentroj kaj universitatoj, ke ili dediĉu seriozan atenton al Esperanto kaj al la rolo kiun ĝi ludis, ludas kaj ankoraŭ ludos en la monda kulturo; kaj

konstatas, ke, enirante sian duan jarcenton, Esperanto kaj la Esperanto-kulturo meritas la agnoskon de ĉiuj, kiuj celas la reciprokan interŝanĝon de kulturaj valoroj kaj la kreon de pli granda internaciisma sento ĉe la homoj el ĉiuj landoj.

toroj —, pola, japana) — ĝenerale sufiĉe bonaj de sia speco — kaj la sciencfikcia *Seksmisio* de Juliusz Machulski. Tiu ĉi, tre sukcesa en Pollando, suferis de la traduktekniko (unu vira voĉo legis ĉiujn rolojn, eĉ de duonnudaj virinoj); sed opinioj ankaŭ diferencis pri la enhavo. Komentis unu spektanto poste: "Amuza stultaĵo — eĉ ne tre amuza." Tio tamen ne malhelpis ĝian popularecon ĉe la filmavida publiko...

Kanto kaj danco: Joëlle superis ĉiujn

Kiel antaŭ ĝuste unu jaro, la kanada kantistino Joëlle Rabu — koncertante dufoje en Ludoviko antaŭ ĉ. milo da homoj — ravis la aŭskultantojn per sia mirinda voĉo kaj persona ĉarmo. Tiuj, kiuj aŭdis ŝin en Pekino, konstatis rimarkindan progreson en ŝia Esperanta repertuaro de post tiu jam brila premiero; ne plu eblas dubi, ke ni ĉeestas la naskiĝon de movada fenomeno. Ŝia ĉi-somera turneo tra Jugoslavio kaj Bulgario espereble naskos sekvojn por venontaj jaroj. Sed ni demandas nin: kial ne eblas eltrovi pli bonajn tradukojn de ŝiaj neoriginalaj kantoj? Apud kelkaj freŝaj rozoj de Roger Bernard kaj aliaj, velkas multaj kiuj altrudas strangan akcenton aŭ torditan frazstrukturo-



klasikaĵo tamen neniel velkis la moderna dokumenta filmo de Roman Dobrzyński, jam aŭgurita en nia marta numero kaj titolita simple: *Esperanto*.

Ĉi tiu ĉ. unuhora filmo prezentas unikan resumon de la stato de Esperanto sojle de ĝia dua jarcento. Temas grandparte pri intervjuoj kun esperantistoj — nur unufoje, ĉe la pola ambasadoro ĉe UN, uziĝas nacia lingvo, kvankam la filmo fotiĝis en tri kontinentoj. Kaj la mesaĝo, kiun la filmo brile sukcesas transdoni, emfazas la naturan funkcion de Esperanto — ke familioj, infanoj, religianoj, movadanoj, profesiuloj uzas ĝin senĝene kaj senmanke por ĉiuspecaj celoj. Oni devas kompreni la potencon de bildoj aŭ mem spekti la filmon por konstati, kiel efika kaj utiligenda ĝi estas por ekstera informado. Kaj inspira por esperantistoj, aparte por tiuj ankoraŭ en la fruaj stadioj de lernado! UEA baldaŭ vendos la filmon kaj ankaŭ videobendojn tra sia Libroservo, kontraŭ merkata prezo; kaj estas tre esperinde, ke Landaj Asocioj en kiel eble plej multe da lingvoregionoj ne nur aĉetos sed investos je subtitoligo, kopiado kaj distribuo.

Inter aliaj prezentitaj filmoj estis kelkaj turismaj/informaj (franca — farita rekte en Esperanto de filmama-

ron. Nu! sendube kun tempo kaj spertiĝo en Esperanto, ŝi eltrovos repertuaron pli proksiman al la nivelo de ŝia voĉo.

Tra la semajno sukcesis multaj aliaj muzikaj programejoj. Ni menciuj la tre popularajn koncertojn en la parko Lazienki, interalie de la fama kant- kaj dancensemblo de la Varsovia Politekniko; la prezenton de "Gento", esperantista ensemblo de gepatroj kaj infanoj el Pŭock kiu mem verkas parton de sia repertuaro; la tre bonetosan koncerton de Jerzy Handelik kaj Ĵak LePuil, kiuj proksimas al la statuso de popolkantistoj en Esperantujo; kaj, certe ne laste laŭ populareco, la rokenrolajn vesperojn de Persone kaj Amplifiki — kiam la kongresaj organizantoj finfine sukcesis aranĝi pri la ejo...

Pri la kongresa temo: "Por ke kulturo estu internacia, ne sufiĉas..."

Estis nur unu aranĝo aparte dediĉita al la kongresa temo, "Esperanto — cent jaroj de internacia kulturo", kaj la ĉeesto de apenaŭ cent homoj en tiu Dua Ĝenerala Kunvido ŝajnas pravigi tiun preteratenton. Bedaŭrinde — ĉar ĝuste en nia kulturo ofte mankas diskutado kaj analizado de niaj evoluvojoj. La gvidanto de la sesio, Vilmos Benc-

zik, estas konata kiel unu el la pioniroj en tiu kampo (vd. *Studoj pri la Esperanta literaturo*, La Kritikanto, 1980), kaj iom seniluziiga estis la magra interesiĝo pri la temo. (La similtema prelego de Salvesen en la Esperantologia Konferenco tamen allogis pli da homoj.)

Post mallonga enkonduko de Benczik, en kiu li emfazis la ambiguajn forton/malforton, venon/malvenkon kiu karakterizas la Esperantan kulturon, kvar "kulturitoj" el diversaj fonoj prezentis sian perspektivon pri la temo. Tibor Sekelj parolis optimisme pri la jamaj atingoj, ĉu en nia literaturo, ĉu en la elkreo de iu komuna, parola kulturo de la kongresoj kaj renkontiĝoj. Halina Gorecka, la juna direktoro de KEB (vd. *Esperanto* 1987/p. 112), emfazis la kreaĵon stimolon kiun Esperanto provizas por kulturaj izolitoj; kaj ŝi pledis por pli egala, justa distribuo de la

Esperanta kulturo dum la dua jarcento. La redaktoro de *El Popola Ĉinio* Li Shijun (Ŝiĝun) atentigis pri la granda kultura kontribuo, kiun Esperanto faris en Ĉinio — aparte en la periodo de la verkoj de hungaraj kaj slavaj aŭtoroj. Li plue substrekis la gravecon de turismaj spertoj en la Esperanta kulturo; kaj tiun ideon apogis ankaŭ Benczik, dirante, ke "la spirito de turismo povas prepari fekundan grundon por Esperanto mem". Fine William Auld, eble la plej vaste kvalifikita kontribuanto al la temo, provis starigi difinon de la fenomeno kulturo: ke "kulturo estas la sumo de ĉio, kio diferencigas nian grupon disde aliaj". En tiu kadro li atentigis, ke same kiel pluraj diversaj kulturoj kunekzistas en unu lando (ekz. Skotlando), ankaŭ pluraj kulturoj ignoras landlimojn kaj tial estas internaciaj — ekzemple la grandaj religioj. Kompare kun ili, Esperanto posedas relative malmulte da "kultur-homoj"; tamen la ekzisto kaj vigleco de ĝia kulturo dependas ne de nombroj, sed de la grado de konscia partopreno en ĝi fare de ĝiaj parolantoj.

La diskuto post tiuj prezentoj ne tre viglis. El tio oni eble povus konkludi — kiel cetere pri iuj antaŭaj kongresaj temoj — ke ne ekzistis grandaj diferencoj en la opinioj de la ĉeestantoj, kaj tial ankaŭ ne bazo por vera diskuto. Oni konstatis la malfortecon de la institucioj de Esperantujo, kiujn ni urĝe bezonas por disvastigi kaj pliprofundi la ĝeneralan konon de nia kulturo. Ankaŭ malhelpas eksteraj faktoroj, preter nia regeblo, kiel ekzemple la malsegaj ekonomiaj fortoj de diversaj landoj. Verŝajne Benczik parolis por ĉiuj, kiam li resumis la ĉefan mesaĝon jene: ke la Esperanto-movado devas provi anstataŭi la ŝtatajn strukturojn pere de sia propra komunumo, por ke la vizio de egaleca kaj vere tutmonda internacia kulturo realiĝu en pli ol retorika formo.

Internacia Vespero: Plej sukcesis la pola spektaklo

Scenejo vibranta per la brilkoloraj vestoj de kvardeko da geaktoroj, gedancistoj, gemuzikistoj; muzikado, dancado, kanzonado seninterrompa dum plenaj tridek minutoj; ĉio kun bunta ŝprucanta vervo — jen la spektaklo "Varsovio en la tempo de Zamenhof", prezentita de la Ensemblo de Kanto kaj Danco de Varsovia Politekniko, per kiu kulminis la Internacia Arta Vespero. Ĝia nivelo estis plene profesia, kian ekzemple oni trovas normale ĉe nacia televid-elsendo sed malofte en Esperanta aranĝo.

La pli frua parto de la Internacia Arta Vespero ne estis tiel nepre sukcesa: ĝi estis nek sufiĉe varia, nek sufiĉe internacia. Ĝi konsistis plejparte el kantoj de klasika tipo, prezentitaj de kantistoj el slavaj landoj, iuj profesiaj, aliaj amatoraj: laŭ ordo de apero, Oleg Pijr (baritono, Sovetunio), Ludmila Koceva (koloratura soprano, Bulgario), Aleksandr Radĉenko (baso, Sovetunio), Ilona Heryk-Krawczyk (soprano, Pollando), Jacek Parol (tenoro, Pollando, kiu meritis duan aperon post sia triumfo en la Nacia Arta Vespero), kaj Galina Stanieŝniková (mezosoprano, Ĉeĥoslovakio). Elementojn kun pli da internacieco aŭ da varieco alportis la eta Marcin Borkowski (Pollando), kiu deklamis kun kuraĝo kaj forto; Teresita Inéz Alaniz (Argentino), kiu pianis; kaj Ĉe Jun-hŭi (Koreujo, konata ankaŭ per la Esperanta nomo Hortensio), kiu prezentis tradician kortegan dancon el sia lando kun akompano de ŝalmo kaj tambureto.


Ĉion kunplektis la gvidantino Maria Erdman, muzika redaktoro de Pola Televido. Bone efikis la interesa ideo, projekciigi sur granda ekrano diapozitivon de ĉiu artisto kiun ŝi prezentis al ni; malpli bone la ŝajnaivaj "miskomprenoj" per kiuj ŝi foje provis ornami la

konversacieton kun ĉiu nova artisto. (Tamen tiuj konversacietoj almenaŭ devigis ĉiun artiston mastri, aŭ papagi, elementan scion de la lingvo; kiel decas, ĉio estis en Esperanto.) Reĝisoris Sŭavomir Koehler, scenografiis Bronisŭaw Modrzejewski. (recenzis J.C. Wells)

Konklude: Varsovion oni eble memoros kiel la festan kongreson. Neniam antaŭe oni povis sperti tiel riĉan kaj abundan programon de artaj aranĝoj; estis ĝuste ili, kiuj plene respondis al la defio de sesmil homoj kaj la Jubileo de Esperanto. Apartajn gratulojn meritas Ewa Siurawska, la respondeca LKKano — kies oficejo dum la kongreso restis, simbole, oazo de ordo! Kontraŭ la malhelpoj de la sezono, la kutimaj organizaj malglataĵoj kaj precipe la grandeco de la tasko, ŝi kaj ŝiaj dekoj da helpantoj sukcesis montri, kion kapablas nia kulturo en sia centa jaro.



Supre, la Varsovia Politekniko provizis kulminan finon — je evidenta senŝargiĝo de LKKano Ewa Siurawska, sube!



Premio Deguĉi "por Afriko"

La trian fojon en sinsekvaj jaroj enprogramiĝis "Tago de Paco" kiel aparta aranĝo dum la UK; kaj la ĉeesto de ĉ. 600 homoj en la matena sesio konfirmis ĝian popularecon. Tamen la elekto de la salonego "Ludoviko", kun seĝoj por tri mil homoj, estis evidente tro optimisma! Estas ankoraŭ neklare, ĉu la Tago celas havi manifestan, amasan karakteron, aŭ eduki kaj konsciigi esperantistojn pri porpaca aktivado, aŭ servi kiel praktika forumo por homoj, kiuj aktivas en siaj landaj pacmovadoj.

Aparte sukcesa ero estis la tagmeza premiero de "En Eŭropo ie", klasika hungara filmo de reĝisoro Géza Radványi kun teksto de Béla Balázs. Plenŝtopita salono — ĉirkaŭ 500 homoj — salutis per emociiĝo kaj aplaŭdo tiun kortuŝan, Esperante sinkronigitan rakonton pri bando de militorfoj, kiuj serĉas bazon por nova vivo. La neesperantista sonreĝisoro, István Vajda, mem ĉeestis tiun unuan prezenton — por kontroli, kiel li diris, "ĉu oni ridas kiam oni devus ridi kaj ploras kiam oni devus plori!". Intervjuo kun li, pri tiu inaŭgura projekto kaj pri iuj multe pli vastaj liaj planoj, aperos en nia oktobra numero.

La planita kulmino de la Tago ĉi-jare estis la unua transdono de la Premio Onisaburo Deguĉi de UEA, komence de la posttagmeza sesio (kiun ĉeestis bedaŭrinde nur duono de la matenaj partoprenintoj). Ĉi tiu nova premio, kiu inkluzivas monsumon de 4000 guldenoj, baziĝas sur grandioza donaco de Esperanta Propaganda Asocio de Oomoto; ĝi celas stimuli agadon per Esperanto por interhoma paco kaj kompreno, laŭ la tria celo de la Statuto de UEA. La unua aljuĝito estas nomo tre ofte menciata en niaj paĝoj: Hans Bakker (Nederlando), kies sindediĉa kaj strategie brile kunordigita laboro dum la lastaj sep jaroj

kreis la unuan solidan bazon por afrika Esperantomovado. Dum la transdono, grupiĝis apud li sur la scenejo dek tri afrikaj reprezentantoj, kies juna vervo kaj lingva kompetento mirigis ĉiujn dum la semajno kaj kies ĉeesto perfekte bildigis la motivojn de la premio. En mallonga sed bele trafa parolado, Bakker emfazis ke la utiligo de Esperanto kaj pli gravas kaj pli malfacilas por afrika movado, kiu nepre bezonos vastan solidaran helpagadon por realigi sian potencialon.

La cetera programo konsistis el matena "libera tribuno" — por veteranoj de milito, batalo aŭ konflikto — kaj posttagmeza "komuna konsultado" por aktivuloj el diversaj landaj pacmovadoj. La kunordiganto de la Tago Yosi-mi Umeda sukcesis eltrovi tridekon da prezentoj el preskaŭ sama nombro de landoj, kiuj montris, kiajn unikajn eblecojn prezentas Esperanto por tiaj spert-interŝanĝoj. Aparte emociigaj estis la rakontoj pri propraj dummilitaj spertoj. Sed kiel ofte okazas, mankis iu fokuso en la diskutoj, kaj la esprimo "libera tribuno" efektive validis por la tuta tempo.

TAGO DE LA LERNEJO

Humuro, dramo kaj informado

La Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) organizis en Varsovio la tradicion Tagon de la Lernejo. Antaŭ proksimume 600 personoj la vicprezidanto de ILEI, Edward Symoens, post kelkaj enkondukaj vortoj prezentis Stefan MacGill kaj Georges Sossois, kiuj kune organizas la matenan kunsidon pri la ĝenerala temo: Humuro, ludo kaj dramo en la instruado. Malgraŭ la manko de materiaj rimedoj (i.a. nigra tabulo, grandformata papero, k.s.) la du aktoroj — ĉar aktoroj ili estas! — dum du horoj per skeĉoj, amuzaj klarigoj kaj ekzemploj senhalte kaptis la atenton de la vasta publiko, kiu ofte ridegis, sed samtempe eklernis kiamaniere trarompi la monotonecon kaj enuon, kiuj tro ofte karakterizas la lingvo-lecionojn...

La posttagmeza sesio estis pli ĝenerale informa. La vicprezidanto, sub la temo "ILEI post la Jubilea Jaro", raportis pri la ĵus okazinta 21a Konferenco de ILEI en Lodzo (vd. venontan numeron de *Esperanto*) kaj sub la gvidado de Zsuzsa Barcsay, la multnombra geinstruistaro aŭdis novaĵojn pri realigoj kaj projektoj en diversaj landoj kaj kontinentoj: Hans Bakker (Afriko), Graham Leon-Smith (Britio), Lian Ziming (Ĉinio), Timár Gábor (Hungario), Claude Nourmont (Francio), Elisabeth Formaggio (Italio) kaj So Gil Su (Koreujo). Irena Szanser raportis pri la okazontaj ekzamenoj dumkongresaj, R. Llorens pri Korresponda Servo Mondskala, Mila van der Horst-Kalinska pri la Cseh-aranĝoj, István Ertl pri *Internacia Pedagogia Revuo* (IPR), kaj Zsuzsa Barcsay mem pri la kvin ĝisnunaj Internaciaj Metodikaj Seminarioj.

Post ronddemando ĉe la publiko, la vicprezidanto de ILEI diris kelkajn konkludajn vortojn kaj anoncis la kadrotemon de la venonta Tago de la Lernejo en Roterdamo: La ĝustaj formoj de la lerneja politiko koncerne la oficialan enkondukon de Esperanto en lernejojn.

E. Symoens

Belartaj Konkursoj de UEA 1987

POEZIO: Unua premio: **Evgenij Belonenko** (Sovetunio) pro *Fabelo pri skarлата floro*; Dua premio: **Karoline Gilmore** (Britio) pro *Tukpinĉiloj*; Tria premio: **Gunnar Gällmo** (Svedio) pro *Kaj mi mortis*.

PROZO: Unua premio: egale al **Liven Dek** (Hispanio) pro *Laŭra* kaj **Spomenka Štimec** (Jugoslavio) pro *Aŭstralio*; Dua premio: **Sten Johansson** (Svedio) pro *La garantiulo*; Tria premio: **Stefan MacGill** (Hungario) pro *La ŝuldo*; Honora mencio: **Velimir Piskorec** (Jugoslavio) pro *Viveroj*.

TEATRAĴO: Unua premio: ne aljuĝita; Dua premio: **Ruth Culbert** (Usono) pro *Ĉio estas en viaj manoj*; Tria premio: **Bernard Golden** (Hungario) pro *Leciono pri "ci"*; Honora mencio: **Vesna Skaljer-Race** (Jugoslavio) pro *Progreso*.

ESEO: Premio Luigi Minnaja: **Oldrich Kníchal** (Hungario) pro *Nia movado kaj ĝiaj kronikistoj*.

KANTO: Premio An-okin: **Dimitr Terziev** (muziko) kaj **Simeon Simeonov** (teksto) (ambaŭ el Bulgario) pro *Jubilea kanto por Esperanto*.

Jubilea rekordo

Per 23 prelegoj de 20 prelegantoj, la 40a sesio de la Internacia Kongresa Universitato preteriris ĉiujn antaŭajn normojn por Universala Kongreso. Per tio ĝi donis bonvenan pezon al la kongresa programo, kiu alikaze — oni povus diri — tro emfazus la festan karakteron de la centra jubilea aranĝo. Sed kongreso, kie oni povis informiĝi kaj edukiĝi pri ekonomiko, lingvistiko, literaturo, ĉelbiologio, psikiatrio ktp, flanke de profesiaj kaj ofte eminentaj fakulojn tiuj kampoj, plenrajte reĵetas ĉiujn akuzojn pri neseriozeco.

Kiel rektoro de IKU oficis ĉi-jare profesoro Juan Régulo Pérez, kiu ne nur atingis eminenton en sia profesio —

4a Kooperativa Konferenco: Modela utiligo de la UK

Inter la amasoj de fakaj aranĝoj, kiujn enkadrigis la 72a UK, elstaris tiu de la internacia kooperativa movado. La unuan tagon el du oni dediĉis al informinterŝanĝo, pere de prelegoj el Pollando, Germana DR, Ĉeĥoslovakio, Hungario, Bulgario, Estonio (Sovetio), FR Germanio, Britio kaj Japanio, en la ĉeesto de 130 homoj el 15 landoj. Tiel utila oni trovis tiun sperton, ke la konferencanoj interkonsentis poste aperigi la referaĵojn en presita formo.

La dua tago estis dediĉita al la fondo de Internacia Kooperativa Esperanto-Organizo (IKEO). Jam kvar jarojn laboris por pretigi la Statuton internacia preparkomisiono, kontakte kun la Internacia Kooperativa Asocio, unu el la plej grandaj mondskaiaj neregistaraj organizaĵoj. La direktoro de la Asocio, s-ro Robert Beasley, sendis siajn salutojn al la kunveno kaj esprimis la kunlaboremmon de sia asocio kun la Esperanto-movado. Detala debato kun pli ol 20 intervenoj kondukis al akcepto de la Statuto de IKEO, kies centra organo, la revuo *Kooperativa Stelo*, troveblas ĉe Pf. 191, Bekescsaba, Hungario.

Se pli el la fakaj movadoj en Esperantujo laborus tiel efike kaj profitus la latentajn eblojn de niaj strukturoj, nia ekstera prestiĝo kaj interna viglo estus kelkoble pli grandaj!

hispana filologio — kadre de la Universitato de La Laguna (Kanariaj Insuloj), sed ankaŭ vaste kontribuis al la Esperanto-movado.

Estus plaĉe povi trakti ĉiujn prelegojn laŭmerite en ĉi tiuj paĝoj, kio kompreneble ne eblas. Iuj tekstoj eventuale trovos vojon al enlibriĝo; la aliaj stimulu vin al venontfoja ĉeesto! Jen tio, kion vi trafis aŭ maltrafis en Varsovio: —

William Auld (Britio), "La signifo de Robert Burns en la skota socia vivo"; Vilmos Benczik (Hungario), "Evolutendencoj en la postmilita Esperanta prozo"; Marjorie

Boulton (Britio), "La Esperanta teatro"; Marian Dobrzyński (Pollando), "Pri la kulturo de organiziĝo"; Hans Eichhorn (Germana DR), "Psikiatrio — neebila medicina disciplino inter Kraepelin kaj Basaglia"; Rudi Hauger (Svislando), "Kiel science sintenas la scienco?"; Sin'itirō Kawamura (Japanio), "Kemio antaŭ cent jaroj, precipe pri la studoj de Emil Fischer (1852-1919) pri sukeroj"; Leszek Kordylewski (Pollando), "Muskoloj — vivanta maŝino"; Erich-Dieter Krause (Germana DR), "La evoluo de la leksiko de Esperanto kaj ĝia evoluigo"; Ralph A. Lewin (Usono), "Praktika fikologio — la uzo de mikroskopaj algoj por homaj celoj"; Ulrich Lins (FR Germanio), "La heredaĵo de Hector Hodler"; Heinz Dieter Maas (FR Germanio), "Formala teorio de tradukado"; Carmel Mallia (Malto), "La malta literaturo"; Béla Mészáros (Hungario), "Regenerado de organoj, histoj kaj ĉeloj en la animala mondo"; So Gilsu (Koreio), "Sana vivo, kontenta vivo, longa vivo"; Adomas Vaitilavičius (Sovetunio), "Kovno kaj la kovna gubernio dum la zamenhofaj tempoj"; Amri Wandel (Usono), "De Kopernikus ĝis Einstein: la evoluo de moderna astronomio"; Bengt-Arne Wickström (Norvegio), "Ekonomiaj teorioj pri juŝteco"; A.P.M. Witkam (Nederlando), "DLT — novaj eblecoj per Esperanto"; kaj serio de kvar prelegoj de John Wells (Britio), "Lingvoj de orienta Azio", "Lingvoj de suda Pacifiko", "La strukturo de la kimra lingvo", kiuj formis iuspecan daŭrigon de lia en Vankuvero tre populara prelegaro, "Lingve tra la mondo".

Dekstre: Vilmos Benczik klarigas iun evolutendencon...

ESPERANTOLOGIA KONFERENCO

Atingis maksimumon

La ĉi-jara (10a) Esperantologia Konferenco reprezentis la kulminon de tio, kio eblas kadre de Universala Kongreso. Tion konstatis poste la estraro de la Centro por Esploro kaj Dokumentado — kaj ne senkaŭze, ĉar la plenplena salono de ĉirkaŭ 500 homoj, elokventaj kaj trafaj prelegoj kaj posta plurflanka debato vere modelis por la serioza pritraktado de lingvo kaj movado. Ankaŭ bonega estis la ideo havigi resumojn de la prelegoj jam antaŭ la konferenco, ebligante antaŭan pripensadon de la temo kaj pli nuncitan aŭskultadon de la preleganto. Laŭdojn pro ĉio ĉi meritas principe Ryszard Rokicki, la kunordiganto kaj samtempe redaktanto de *Informilo por Interlingvistoj*, kie aperis la resumoj (ankoraŭ havebla de Akademia Centro Interlingvistika, Rada Naczelna ZSP, ul. Ordynacka 9, PL-00-950 Varsovio).

La kvar prelegoj kovris la kampojn de la historio, kulturo, lingvistiko kaj sociologio de Esperanto, sed kompreneble laŭ diversaj emfazoj. Ulrich Lins elektis fokusiĝi ĉe la historiografio de Esperanto, t.e. la maniero en kiu oni ĝis nun verkis pri ĝi. Per sia klara, ekvilibra stilo li reliefigis la altojn ĝisnunajn — Privat, Drezen, Waringhien, Boulton, Miyamoto inter aliaj — kaj ankaŭ la malaltojn (ekzemple *Historio de Esperanto* de Courtinat), la konstateblajn tendencojn kaj ideologiojn, kaj la evidentajn mankojn kiujn oni bezonas priatenti. Kvankam li trovas la nunan staton tute ne kontentiga, li atentigis pri iuj evoluoj —

Terminologia Esperanto-Centro fondita

En vendredo, la 24a de julio, la Komitato de UEA akceptis la Regularon de TEC, kiu tiel fariĝis oficiala institucio de UEA. La modele kunordigitaj preparlaboroj de Wera Blanke (GDR), Iván Bujdosó (Hungario) kaj Jan Pospíšil (Ĉeĥoslovakio) tre bone impresis la komitatanojn, kiel garantio pri serioza, firme bazita kaj vere internacia disvolviĝo de juna sed treege grava projekto.

La oficialaj celoj de TEC estas jenaj (para. 2 de la Regularo, iom mallongigita):

1. Plibonigo kaj unuecigo de terminologia laboro en la internacia planlingvo Esperanto, pere de:

1.1 studado de internacia terminologi-normiga agado, diskonigo kaj adapto al bezonoj de Esperanto (esploro kaj

1.2 organizado de internacia, faka kaj interfaka diskutoj pri terminar-proponoj;

1.3 organizado de aproba procedo, inkl. finan aprobon de la Akademio;

1.4 eldonado kaj reviziado de normaj dokumentoj.

2. Reprezentado de Esperanto en naciaj kaj internaciaj terminologiaj kaj normigaj institucioj, kontakte kun la Komisiono de UEA pri Eksteraj Rilatoj.

La ĉefa financa bazo de TEC estas la Fondaĵo Wüster de UEA.

Ĉi-numere mankas spaco por detaligi la strukturon, reton de kunlaborantoj kaj tujan planaron de la nova Centro, sed ni certe revenos al la temo en postaj numeroj.



aparte en lingvoj aliaj ol Esperanto — kiuj donas bazon por espero. La posta diskuto, kiel ĉiuj aliaj tre multnacia, koncentriĝis ĉe diversaj sentataj mankoj en la havebla literaturo.

Neil Salvesen, la eldonisto de Esperantaj Kajeroj, elektis trakti la kulturon de Esperanto per sufiĉe densa, ideoriĉa sed ne ĉiam facile sekvebla prelego. Eble lia ĉefa tezo resumeblas jene: la Esperanta kulturo estas realaĵo, kies agnoskon malhelpas la manko de "ŝtataj" institucioj por disvastigi ĝin. Tio siavice nutras la emon eĉ inter esperantistoj trakti la lingvon kiel duarangan. Aliflanke la karakteriza eco de Esperanto, ke oni preskaŭ ĉiam konscie elektas lerni kaj uzi ĝin, donas al ĝi forton neproporcian al la nombro de ĝiaj parolantoj. Multaj ŝancoj kaj defioj rilataj al nia unika situacio restas frontendaj.

La enprogramita preleganto pri lingvistikaj temoj, István Szerdahelyi, ne povis veni al Varsovio pro malsano. Anstataŭis lin la egale konata esperantologo John Wells, kies senpretende klara prelegostilo evidente ravis la aŭskultantojn. Precipe la evoluon kaj ŝanĝiĝon de Esperanto li pritraktis, terenon escepte interesan kaj samtempe nesufiĉe esploritan en multaj rilatoj. Jen simptomo de tio: malgraŭ lia emfazo pri evoluoj aliaj ol en la stilo kaj vortprovizo, kaj speciale en lia propra fako la fonetiko, ĉiuj postaj intervenoj tuŝis nur tiun vortaran kampon: neolo-

gismoj, novaj sufiksoj k.s. En la respondoj de Wells evidentiĝis lia emo sekvi kaj registri la faktan uzon de Esperanto, anstataŭ trudi diversajn "logikajn" elpensaĵojn al la parolantoj: ekzemple en la kazo "komputilo/komputoro", kie lia propra uzo transiris al la unua de la dua.

Detlev Blanke dediĉis la lastan paroladon al t.n. socipolitikaj problemoj de Esperanto. La nerealigo de la originaj celoj de Esperanto, kune kun la multaj malfaciloj ankoraŭ frontataj ene de ĝia komunumo, povus pravigi pesimismon — sed el relativa vidpunkto, ĝiaj jamaj atingoj ebligas certan esperon por la estonteco. Plej grava, laŭ li, estas la interna plifortigo de la esperantistaro: forigo de la — laŭ li — misaj ideoj pri "logiko", "perfekto", "facilo" de Esperanto, kaj aliflanke de tiu senrespekto al la lingvo jam aludita de Salvesen; kaj disvastigo de profesieco kaj ĝenerala "principaro de konduto, informado kaj argumentado". En tiu rilato li esprimis sian pesimismon pri la efektiva funkcio kaj evoluo de la Akademio. Laŭ li, la Esperanta komunumo bezonas iun "Internacian Konsilantaron" de ekspertoj, homoj efektive respektataj kaj aŭskultataj, ne nur interne de Esperantujo sed ankaŭ ekstere. En la posta diskuto, plej viglan debaton stimulis lia malakcepto de la vorto "facila" por priskribi Esperanton, kaj post pluraj reagoj fariĝis evidente, ke tiu temo mem sufiĉus por tuta seminario....

Novaj estrarano, institucio; malnovaj diskutoj

La kunsidoj de la Komitato de UEA okazis ĉi-jare dum tri tagoj antaŭ la kongreso mem — plus duhora finkunsido tuj antaŭ la Fermo. Ĉi tiu nova sistemo trovis grandan aprobon inter la komitatanoj, kies plilongigitan semajnon pli ol kompensis la ebleco partopreni la kongresajn aranĝojn. Ŝajnas, do, ke oni daŭrigos laŭ tiu principo en venontaj jaroj — kvankam ĉu antaŭ, ĉu post la kongreso restas decidote.

La ĉi-jaraj kunsidoj, kiel rimarkigis prezidanto Tonkin en la Fermo, estis relative trankvilaj laŭ Komitataj normoj. Ja aŭdiĝis diversaj plendoj kaj konstatoj, ke unu aŭ pli en la triopo Komitato—Estraro—Centra Oficejo ne funkciis kontentige en tiu aŭ alia rilato. Fakte oni apenaŭ povus paroli pri kontento entute. Tamen forrestis bataloj aŭ disputoj, krom pri relative flankaj detaloj, kaj plimulto de la komitatanoj iom pasive travadis sian tagordon.

Centran atenton ricevis — laŭmerite — financaj kaj administraj aferoj. La bilanco kaj spezokonto 1986 trairis preskaŭ senmurmure, kiel ankaŭ la buĝeto 1988, sed pri principaj demandoj ekestis pli longaj diskutoj. G.C. Fighiera prezentis sian raporton (jam menciitan en nia marta numero) pri la strukturo kaj funkciado de UEA, kiu speciale priatentas la organizon de la Centra Oficejo. En la posta diskuto pluraj komitatanoj esprimis sian malkontenton pri la nuna stato de administrado de la Asocio. Simptoma pri la problemoj estis la foresto, dum plejparto de la kunsidoj, de ambaŭ direktoroj — Buller kaj Milojević — pro kongresaj laboroj, tiel ke la "sekretariato" de UEA reprezentigis nur pere de la redaktoro.

Kiel unu sekvo de la diskutoj, la dumkongresa komisiono pri financoj rekomendis restarigon de konstanta Komisiono pri Financoj kaj Administrado, en iom reviziita formo — i.a. ĝi ne limiĝu nur al komitatanoj. La nova komisiono transprenis i.a. la taskon kolekti reagojn al la rapor-

to Fighiera kaj ellabori rekomendojn por traktado antaŭ kaj en la roterdama UK. En rilata decido, la Komitato apartigis 5000 guldenojn en la buĝeto por 1988 por profesia reviziado de la financoj de UEA.

La eltrovo de nova estrarano pri financoj montriĝis problema. De post la demisio de Victor Sadler en marto pro malsano, neniu en la Estraro okupiĝis speciale pri tiu fakto. Propono de la Estraro, ke nederlandano Kees Ruig okupiĝu pri financoj dum unujara provperiodo, ne kontentigis la Komitaton: unue ĉar temas pri relative nekonsistenta homo, due ĉar plimulto deziris tuj havi novan estraron pri financoj.

En la fina kunsido, tuj antaŭ la Fermo, unu kandidato prezentiĝis: G.C. Fighiera, la aŭtoro de la menciita raporto. Ankaŭ tiu ĉi kandidatigo ne estis senproblema, ĉar Fighiera postulis akcepton ĉe la Komitato de sufiĉe longa kaj detala rezolucio kiel antaŭkondiĉon por sia posteniĝo. Ĉar mankis tempo por detala diskuto, la Komitato akceptis la rezolucion kun la kompreno, ke en tiu ĉi kazo ĝi nur faras rekomendojn kaj ne devigas la Estraron ilin sekvi; kaj UEA ricevis novan estraron pri financoj, per 47 voĉoj por, kvar kontraŭ kaj ok sindetenoj.

La programon de Fighiera, esprimitan en tiu rezolucio, oni povus nomi sufiĉe revolucia. Ĝi baziĝas sur la principo, ke la Centra Oficejo okupiĝu pri kaj estu financata de la membraro de UEA; do taskoj kiuj ne rekte koncernas la membraron traktiĝu aliloke. Lia detala raporto ricevos plian atenton en niaj postaj numeroj.

Post financoj kaj administrado, plej longan diskuton okazigis la demando de Universala Kongreso en Afriko. La Komitato rezolucie emfazis sian aprobon de la projekto, kiu venigis reprezentantojn de 13 afrikaj Esperanto-organizaĵoj al Budapeŝto, Krakovo kaj Varsovio, kaj alvokis al daŭra subtenado de la naskiĝanta afrika movado.

Bjalistoka Esperanto-Centro je la nomo de Zamenhof?

Jen resumo de la nuna stato de ĉi tiu projekto, ĉampane lanĉita en la Solenaj Inaŭguroj.

Jam en Bjalistoko estas rezervitaj kvar hektaroj, urbocentre, por konstruo de la Centro. Temas pri malnova vendoplaco, kiun (laŭ la legendoj) frekventis ankaŭ la juna Ludoviko. La fondo-dokumenton por la Centro subskribis i.a. reprezentantoj de Bjalistoko, de la pola parlamento, de Pola Esperanto-Asocio kaj de UEA. Tiu dokumento tamen restas ĉefe simbola, kaj la formo, financado kaj administrado de la Centro restas definitivigotaj post pli longaj kaj detalaj diskutoj. Laŭ propono de Malinowski, la Centro estus gvidata de komitato reprezentanta la urbon kaj vojevodion, la polan kaj la internacian Esperanto-movadojn.

Principe, la Centro estu samtempe monumento al d-ro Zamenhof kaj renkontejo de la Esperanto-movado. Eventuale la jenaj kvar roloj povus kuniĝi en ĝi: **1**—esplorfako de la bjalistoka universitato (baldaŭ sendependigota de Varsovio) pri esperantologio, interlingvistiko kaj problemoj de internacia kompreniĝo; **2**—kursejo kaj konferencejo por la pola kaj internacia Esperanto-movadoj; **3**—historia kaj kultura muzeo, speciale pri la fruaj jaroj de Esperanto; **4**—prezentejo de la Esperanto-kulturo por la ekstera publiko.

La Komitato de UEA aprobis en Varsovio la kunlaboron de la Asocio en tiu ĉi projekto. Tiu aprobo ne implicas financajn sindevigojn; tamen estas kompreneble, ke la polaj iniciatintoj esperas pri kontribuoj de la internacia Esperanto-movado al la fonda kapitalo de la Centro. Ekzistas jam konto tiucela ĉe UEA, kien oni povas sendi donacojn (al la Centra Oficejo) kun la indiko "Bjalistoko". Pli utilaj en la nuna stadio, tamen, estos sendado de ideoj, proponoj, opinioj pri la celoj kaj funkciado de la Centro. Espereble ni povos "aerumi" ilin en la paĝoj de tiu ĉi revuo ĝis la roterdama UK; ĉiuj iros poste al la estraranoj de UEA por diskuto kaj prilaboro.

Tamen koncerne la konkretan kazon de la UK en 1990, pri kiu ankoraŭ ne ekzistas formala invito, multaj komitatanoj esprimis dubojn. La afrikanoj mem — t.e. la grupo ĉeestanta en Varsovio — substrekiis la neceson de surlokaj organizantoj, deĵorantaj tie dum unu-du jaroj antaŭ la kongreso. Sekve de la diskuto, granda plimulto de la komitatanoj opiniis afrikan kongreson en 1990 tro ambicia. Oni pli favorus malpli grandskalan konferencon aŭ seminarion. La Estraro estis taskita fari rapidan decidon pri la UK en 1990 kaj doni apartan atenton al la invito de Kubo.

El aliaj menciindaj punktoj:

- La Komitato aprobis la kunlaboron de UEA kun la projekto pri Esperanto-Centro en Bjalistoko. (Vd. la apudan tekston.)
- Terminologia Esperanto-Centro (TEC) estis oficiale fondita kiel institucio de UEA, financata precipe el Fondaĵo Wüster. (Vd. artikolon sur p.163.)
- La junulara sekcio de UEA, TEJO, ekde Varsovio ricevas du komitatanojn A anstataŭ nur unu. (Pli pri la TEJO-kongreso kaj -elektoj venontnumere.)

Tiuj eroj estas prenitaj el la kutima amaso da rezolucioj, kiuj ĝenerale sekvas la ekzemplon de siaj novjaraj kuzoj. Inter la belaj ideoj kaj espero de la unuopaj komisionoj/sektoroj kaj ilia realigo troviĝas pli ol unu abismo. Ni do ne raportos detale pri ili, ĝis ili atingos iun gradon de efektiviĝo; sed nur konstatos, ke en Varsovio la Komitato rezoluciis pri kulturo, faka agado, landa agado, scienc-teknika aplikado, ekstera informado, edukado, virina agado, rilatoj kun UN kaj Unesko, turismo. Ŝajne ekzistas iom da intereso pri tio, ke la roterdama UK enhavu pli da publika diskutado pri la ĝeneralaj celoj kaj funkciado de UEA — kadre de la preparado kaj adopto de nova trijara laborplano.

Ne nur unu sed du bankedoj ornamis la Komitatan tagordon en Varsovio. La tradicia invito de Oomoto, kun s-

UNUA ĜENERALA KUNSIDO

La Unua Ĝenerala Kunsido, kie la Komitato publike traktas la Estraran Raporton pri la pasinta jaro, estis en Varsovio trankvila ĝis tedeco. La "publiko" ĉi-foje reduktiĝis al centoj da homoj kaj manpleno de intervenantoj.

El la esprimitaj kritikoj, nur kelkaj tuŝas aferojn de principo kaj ne simpla detalkorektado. Audrey Childs-Mee (Nederlando) kritikis la nekonsekvencan utiligon de la komputilo en la Centra Oficejo, kie ankoraŭ mankas trejnita komputisto. Pluraj komitatanoj kaj aliaj intervenis pri la demandoj de la Jubilea Jaro kaj informado, por esprimi sufiĉe grandan mal-kontenton. Amri Wandel (Israelo/Usono) atentigis, ke la rezolucioj en Aŭgsburgo kaj Pekino pri informado portis neniun ŝanĝon en la C.O. Ursula Grattapaglia (Brazilo) kritikis la prokraston de publikigo de la Internacia Patrona Komitato por la Jubilea Jaro. Bruĉjo Casini (Italio) kaj Werner Bormann (FR Germanio) plendis pri la manko de esperantlingva gazeta servo, kaj la Komitato akceptis proponon ke ĝi denove funkciui kadre de la roterdama UK. Ĝenerale oni sentis, ke UEA ne bone prizorgis la tegmentan planadon de la Jubilea Jaro; la Ĝenerala Direktoro, kiu ricevis tiun taskon en Pekino, en realo plejparte okupiĝis pri la Universala Kongreso. Post ĉiuj ĉi kritikoj kaj kelkaj ŝanĝetoj, oni akceptis la Raporton.

ro Deguĉi kiel bankedestro, realiĝis vendrede la 24an; kaj Bahaa Esperanto-Ligo invitis al dua festeno lunde la 27an. Kadre de la Oomoto-bankedo estis anoncita la elekto de Detlev Blanke (Germana DR) kiel la plej aktiva komitatano en la pasinta jaro.



Por eviti homamasojn ĉe la tombejo, ne okazis formalaj kongresaj vizitoj al la tombo de Zamenhof; sed membroj de la Estraro de UEA kaj la familio Iris tien por lasi florojn nome de la kongresanoj.

La iel-tiela kompletigo

"Estas iom malfacile fermi ĉu tiun kongreson!" Tiel la Prezidanto de UEA je sabata tagmezo, kiam la Solena Fermo preterpasis sian anoncitan finon kaj trankvile enmarŝis trian horon. La problemo certe ne unikas je Varsovio — jam de jaroj la listegoj de salutoj kaj dankoj, de rezolucioj kaj informoj, obstine rifuzas teniĝi en decaj limoj. En Varsovio temis nur pri pli granda nombro de pacienuloj. Ĉirkaŭ tri mil homoj traatendis la "solenaĵojn", eble eĉ iom feliĉaj tiel prokrasti la adiaŭojn, por povi je la fino stariĝi kaj kune levi la voĉojn en la inaŭgura Himno de la dua jarcento.

Post enkonduka kantado de la 60-voĉa Internacia Esperanto-Ĥoro, kies dumkongresa ekzercado portis belajn rezultojn, d-ro Humphrey Tonkin faris la tradician provon resumi la pasintan semajnon. Epitetante ĝin "unu la plej grandiozaj kongresoj", li memorigis pri sia antaŭa kongreso en Varsovio, en la Zamenhofa Jaro 1959: "ankaŭ inter la plej grandiozaj, sed tiam tamen restis vakaj lokoj en ĉi tiu salono. Intertempe Esperanto impete antaŭeniris — ĉar la homa sopiro pri paco estas pli forta ol ĉiuj bariloj, ol ĉiuj malhelpoj."

Sekvis la prezento de la podianoj, al kiuj ĉi-foje aldoniĝis la urbestro kaj vojevodo de Bjalistoko. D-rino Flora Szabó-Felső transprenis la mikrofonon por resumi la laborojn de la kongreso, per listo efektive grandioza laŭ sia longo; ĉar la enhavo jam artikole speguliĝis ĉi-numere, ni ne plu detaligos, same kiel pri la traktado de la kongresaj rezolucioj. Kvazaŭ gratule, la Internacia Esperanto-Ĥoro intervenis per la Jubilea Kanto por Esperanto, gajninto de la Premio An-okin en la Belartaj Konkursoj.

Kvin elstaraj esperantistoj eniris ĉi-jare la Honoran Membraron de UEA. Al la Honora Patrona Komitato estas nomita d-ro Ĝang Ĉung-Sik, prezidanto de Universitato Dankook en Koreio kaj membro de la Korea Olimpia Komitato, samtempe prezidanto de Korea Esperanto-Asocio. Honoraj Membroj fariĝis d-ro Ludoviko Zaleski-Zamenhof, s-ro Jozef Toczyski (Pollando), prof. Boža Popović (Jugoslavio) kaj mag. William Auld (Skotlando). (Biografioj de la honoritoj troviĝos en nia oktobra numero.) La prezidanto de UEA vokis la koncernatojn al la scenejo por transdoni gratulojn kaj librojn, kaj ĉiuj respondis per kelkaj vortoj kiuj vekis aplaŭdojn ĉe la aŭskultantoj. Auld, memorigante pri la plendo de Kalocsay en "En amara horo", ke li estas "poeto sen popolo", deklaris simple: "Mi estas poeto — kaj vi estas mia popolo."

Kelklinie pri...

Dokumentoj: Ĉefa ornamaĵo de la varsovia dokumentujo estis la ses turismaj broŝuroj de Orbis, kovrantaj tutan Pollandon kaj riĉe ilustritaj. Plej mirakla, tamen, estis la 272-paĝa Kongresa Libro, kiun sub la gvido de Osmo Buller pretigis roterdamaj kaj antverpenaj oficistoj en apenaŭ pli ol unu semajno, kaj kiu atingis la kongreson nur du tagojn antaŭ la malfermo de la ĝiĉetoj...

Libroservo: La aĉetemo de la partoprenantoj en ĉi tiu "kultura" kongreso superis ĉiujn atendojn. Jam meze de la semajno elĉerpiĝis preskaŭ ĉiuj titoloj, kaj la fina sumo de la vendoj superis 11 milionojn da zlotoj. Tamen el klienta vidpunkto kondiĉoj ne perfektis: antaŭ ol atingi la komforte ampleksan vendospacon, oni ofte devis vicostari eĉ horojn en mallarĝa koridoro, kaj denove ĉe la kaso necesis atendado. Pri ĉio tio tamen kulpas ne la deĵorantoj, kiuj esence forferis sian kongreson por helpi al UEA, sed la manko de taŭga antaŭplanado flanke de LKK. Bedaŭrinde la frustrigintaj kongresanoj ne ĉiam atentis tiujn nuancojn, kaj foje kondukis hontinde malĝentile...

Bankedo kaj Balo: Ambaŭ suferis ĉi-jare de la nombro de partoprenantoj kaj la manko de sufiĉe granda salono. Tamen la 700 bankedanoj kaj la du-trimiloj ĉe la Balo ĝuis bonajn manĝon kaj muzikon en festa etoso. Trafa koncepto estis la paralelaj baloj — sur malsamaj etaĝoj kaj provizitaj per tute malsamspaca muziko — kiuj celis kontentigi la diversajn gustojn de junularo kaj... nejunularo.

Regulo/Auld: Kelkaj libroj premieris dum la kongresa semajno, el kiuj elstaris la bindita kolektita poemaro de William Auld, *En barko senpilota* (Edistudio), kaj la dua volumo de *Serta gratulatoria in honorem Juan Régulo*, "Esperantismo", kiun oni prezentis ĉe la inaŭguro de la Internacia Kongresa Universitato. Recenz(ar)on pri la enhavo de la 790-paĝa *Serta* ni publikigos en posta numero.

Parlamentejo: Estis preskaŭ unika ŝanco dum la kongreso ekskursi tra la sidejo de la Pola Parlamento (Sejmo) sub la gvido de ties prezidanto, la Alta Protektanto s-ro Malinowski. Liaj rektaj komentoj kaj respondoj al demandoj eble mirigis kelkajn kongresanojn, kiuj ne antaŭe spertis tiun karakterizan polan trajton.

Aliĝoj kaj membriĝoj: Kvankam la kongreso ne atingis la magian ciferon de 6000 aliĝoj, alia baro falis dum la semajno: la membronombro de UEA transpasis, unuafoje en 14 jaroj, la limon de 7000 Individuaj Membroj.



Ekumena diservo: Ĉirkaŭ tri cent personoj ĉeestis la ĉi-jaran dimanĉan diservon en la preĝejo de la Sankta Triunuo. Predikis pastorino Jelly koopmans-Schotanus el Nederlando. La monkolekton oni celis al tri bonfaraj esperantistaj organizaĵoj: Bona Espero (edukado de brazilaj orfoj), iniciato de d-ro Kondor por helpo al lepruloj, kaj Agado E3 (mildigo de vidproblemoj en diversaj triamondaj landoj).

Post prezento de la rezultoj de la Belartaj Konkursoj, la parolvico iris al la Alta Protektanto por liaj finaj salutoj. "Ĉio bona finiĝas", deklaris Malinowski, "sed la atingoj de via Universala Kongreso, kiujn ni kreis kune, daŭros." La ni-formo bele simbolis la simpatiemon de la parlamenta prezidanto, kiu la antaŭan tagon fariĝis membro de Pola Esperanto-Asocio.

Transprenis la mikrofonon d-ro Zaleski-Zamenhof por esprimi siajn dankojn al la organizintoj kaj kunlaborantoj de la kongreso. Aparte li parolis pri sia impresiĝo je la "moderna aspekto" de la movado, en kiu li ne multe aktivis lastatempe; kaj li komentis fine, ke lia avo "sendube estus ege feliĉa, vidante la disfloron de siaj humanismaj ideoj en ĉi tiu moderna epoko". Post lia parolado, la kongresanoj stariĝis kaj eksilentis dum mallonga paŭzo, por memori kaj omaĝi la pionirojn kiuj dediĉis kaj foje oferis siajn vivojn al la pluvivigo de Esperanto.

S-ro Yosimi Umeda, vicprezidanto de UEA, tiam prezentis la Trofeon Fyne — aljuĝatan al la plej aktiva landa sekcio de UEA en trijara periodo — al Bulgara Esperanto-Asocio. BEA faris mirindajn progresojn en la lastaj jaroj, inkluzive atingon de 10 000 membroj, plivastigon de sia eldonado, enkondukon de Esperanto kiel normala lerneja studobjekto ktp. La Trofeon sekvis aliaj prezentoj de diversaj medaloj k.s. al la podianoj (el spektanta vidpunkto la plej oscediga ero de la tuta Fermo: jam ekformiĝis spali-

roj ĉe la elirejoj).

Fintraktinte la solenaĵojn, Tonkin pluiris pri la dankoj: al la pli ol 600 homoj en la artaj aranĝoj, al la aliaj kontribuantoj al la programo, al la polaj deĵorantoj kaj helpantoj, ktp, ktp. La membrojn de la Loka Kongresa Komitato oni vokis sur la scenejon por ricevi la aplaŭdan dankon de la ĉeestantoj; kelkaj tamen ne ĉeestis, kaptite aliloke de ankoraŭ nefinita laboro. Tonkin denove memorigis la kongresanojn pri la planoj de Esperanto-Centro en Bjalistoko, substrekante la partoprenon de la internacia movado en ĉi tiu unuavice pola projekto. Kaj li ankaŭ emfazis, ke la venontjara kongreso havos malsaman karakteron: "Roterdamo estos tre severa, kaj via ĉeesto estos deviga!" Temas interalie pri la akcepto de nova Laborplano por la jaroj 1988-1990. Ĉar venontjare la kongreson gastigos UEA, Tonkin mem devis akcepti la simbo- lan flagon kiun transdonis s-ro Stanisław Świstak, prezidanto de la varsovia LKK — ĵus ricevinte ĝin el la manoj de Tonkin...

Iel-tiele kompletiĝis la 72a Universala Kongreso de Esperanto, la simbola fokuso de la Jubilea Jaro de la lingvo. Ĝi estis festa kongreso, kiu elstaros en la memoroj de la ĉeestintoj precipe pro tio, ke ĝi povis okazi. Ke en la naskiĝurbo de Esperanto kolektiĝis ses mil esperantistoj el ĉiuj partoj de la mondo, por pruvi, ke la revo de la juna Zamenhof plu vivas kaj disfloras en la koroj de la homoj.



Fakaj kunvenoj: Pli ol kvardek kunvenoj de fakaj asocioj okazis dum la kongresa semajno, ne nur tiuj enprogramitaj sed ankaŭ pluraj kiuj spontane elkreskis surloke. Nekompleta listo bele spegulas la universalecon de nia centjara movado: artistoj, aŭtomobilistoj, bahaanoj, blinduloj, etnistoj, fervojistoj, filatelistoj, filologoj, filozofoj, forstistoj, geonkloj esperantistaj, go-ludantoj, handikapitoj, ĥoranoj, inistoj, instruistoj, ĵur-

nalistoj, katolikoj, komercistoj kaj ekonomikistoj, komunistoj, kooperativanoj, kristanoj, kvakeroj, medicinistoj, mormonoj, muzikistoj, naturistoj, oomotanoj, ornitologoj, pacmovadanoj, poŝtistoj, radioamatoroj, sciencistoj, skoltoj, spiritistoj, ŝakistoj, terminologoj, turismistoj, vegetaranoj, verduloj, verkistoj, veteranaj esperantistoj.

Ekskursoj: Preskaŭ kvar mil vendiĝis dum la kongresa semajno. Ĉirkaŭ 1300 homoj partoprenis la urbajn ekskursojn de Esperantotur, kaj 900 la vesperajn ekskursojn de Orbis. Sed estis la pilgrimado al Bjalistoko, merkrede, kiu plej kaptis la kongresanojn: el ĉ. 1700 partoprenantoj de la tuttagaj ekskursoj, preskaŭ 1500 elektis fari omaĝveturon al la naskiĝloko de Ludoviko.

Bufedoj: Malgraŭ plurflankaj duboj antaŭ la komenco de la kongreso, la bufeda sistemo en la diversaj salonoj brile funkciis. Tamen ĝenis la fakto, ke neniuj deĵorantoj ŝajne komprenis eĉ unu vorton de Esperanto je la komenco. Certe ne necesus multe da streĉo por instrui la Esperantajn ciferojn ĝis cent, vortojn por kafo, teo ktp...

Kongresa Kuriero: Evidentiĝis lastmomente, ke la necesaj materiaj kondiĉoj simple ne ekzistas por la planita luksa eldono de la ĉiutaga kongresa gazeto. Fajrobrigade ekdeĵoris LKK-ano Andrzej Pettyn, sed eĉ tio ne sufiĉus sen la sindona kunlaboro de Stano Marček (redaktoro de *Slovaka Esperantisto*), kiu efektive foruzis sian tutan semajnon por produkti, per simpla sed efika tekniko, la sep-kajduonan numerojn. La popularecon de la Kuriero pruvis la rapida malapero de ĝiaj 6000 ekzempleroj ĉiutage, kvanto kiu montriĝis tute nesufiĉa por la kolektemaj kongresanoj.

Ekspozicioj: Nekutime bunta aro de ekspozicioj ornamis la kongresejon kaj logis la kongresanojn eksteren. En la Palaco mem oni povis informiĝi pri la jenaj temoj: artaĵoj de esperantistoj, junularaj/infanaj afiŝoj pri Esperanto, fotoekspozicio de A^oke Rohdin, polaj Esperanto-libroj, Esperanto-filatelaĵoj... kaj krome spekti, por la unua fojo, la novan vojaĝantan ekspozicion de UEA. Proksime al la kongresejo troviĝis pluraj ekspozicioj pri la kulturo kaj historio de Pollando, inkluzive la tre popularan "Varsovio en la tempoj de Zamenhof" en la parko Łazienki.

Kongreseroj...

La "ora" libro: Pro misa kalkulo aŭ vojerariĝo, la stoko de Kongresaj Libroj montriĝis nesufiĉa por ĉiuj, kiuj surloke aliĝis al la kongreso. Rezulte, la merkata prezo de unuopa ekzemplero atingis, foje, fabelajn altojn. Al Derek Roff (Usono) iu senesperiginta kongresanino proponis, lastaprove, sian unue-naskitan filinon; ni ne scias, ĉu sukcese...

El la buŝoj de beboj: Brilan propagandan efikon — almenaŭ pri la komunikivo de la Internacia Lingvo! — havis la gazetara konferenco de la Infana Kongreseto. En senĝene flua Esperanto, la geknaboj surtabligis siajn plendojn... "Ĉu en Pollando oni manĝas tiujn aĉajn terpomojn ĉiutage?" "Ni ŝatas la polajn infanojn, sed ili tro ofte parolas pole inter si." "Kial la estro de la Kongreseto parolas tiel strangan Esperanton?" La mirantaj ĵurnalistoj devis konstati, ke oni certe ne parkerigis al la infanoj la "ĝustajn respondojn"!

"Paca batalanto": La prezidanto de UEA aperis en nova rolo dum la bjalistoka manifestacio: tiu de kolombotrejnisto. Kiam pluraj dekoj de tiuj birdoj rifuzis ekfari sian pac-simbolan flugon, Tonkin mem entreprenis la instigadon... kaj dum kelkaj minutoj luktis kun la obstinuloj, ĝis la lasta tediĝis kaj ekflugis por serĉi pli trankvilan dormejon.

Diligenta kolegaro: Ĉu la vico de laciĝintaj kongresanoj, sube, provas trovi la fortojn por grimpi al la kvara etaĝo?

Via Plej Supera Moŝto: La adjektivo "elstara" ofte uziĝis por priskribi la rolon de s-ro Roman Malinowski kiel kongresa patrono. Eпитeto duoble trafa: ĉar la preskaŭ du-metra parlamenta prezidanto malfacile perdiĝis en eĉ la plej prema homamaso. Sidante en la Fermo apud la eta figuro de "la alia Roman" (Dobrzyński), Malinowski ricevis bapton de Tonkin kiel "la plej Alta Protektanto, kiun ni havis en la lastaj jaroj".




La studentaj princoj: Tiuj kongresanoj, kiuj mendis malmultekostajn ĉambrojn en studentaj domoj, verŝajne rave surpriziĝis ricevi — kontraŭ sama tarifo — ĉambrojn en hoteloj. Ĉi-kaze la fuŝfaroj de Orbis, kiu ŝajne tute ne rezervis la menditajn domojn, *malmalhelpis* ĝuadon de la kongreso..

Nepre kunhavu vian fadenbulon: Kvankam certe inter la plej belaj kongresejoj (almenaŭ interne), la Palaco de Kulturo kaj Scienco tamen havis iujn mankojn el praktika vidpunkto. Ĉu ekzistas eĉ unu kongresano, kiu ne perdiĝis en tiu labirinta salonaro survoje al Kabe, aŭ Zawada, aŭ Kotarbiński? Oni foje demandis sin, ĉu kelkaj blankharaj kongresanoj ne estis fakte partoprenintoj el 1959, kiuj post 28 jaroj ankoraŭ ne trovis la elirejon el la sesa etaĝo...

Konkurenco por DLT: La voĉo de Andrzej Pettyn, konata al miloj da homoj per la Esperanto-elsendoj de la Pola Radio, aŭdiĝis en multaj publikaj aranĝoj dum la semajno. Temas pri la rolo de Pettyn kiel interpretisto inter la pola kaj Esperanto — en kiu rolo li certe enviigis la esploristojn de aŭtomataj traduk-sistemoj. Kiam, en postkongresa bankedo de LKK, la prezidanto de UEA ekstaris kaj komencis paroli, tuj la ankoraŭ-enŝaltita komputilo de Pettyn ekprovizis laŭtan tradukon en la polan.

Kaj li diris: "Multiĝu!": Se nur ĉiuj Esperanto-kursoj raportus saman sukceson, kiel la kongresaj Cseh-kursoj de Audrey Childs-Mee (Nederlando)... Laŭ oficiala raporto de Mila van der Horst-Kolinska, komencis ĝin 52 personoj kaj finis... 97!



La vualo de l' tempo

de J.H. Sullivan (1913)

Dudek originalaj noveloj, en kiuj "rolas la propra stilo de Sullivan, kiu sukcesis esprimi sin per ekvilibre riĉa, klara kaj flua lingvaĵo,... sed la plej trompa trajto estas la fino de ĉiu novelo...: vi neniam trovos..."

Georgo Camacho

Eld. TK/Stafeto, 1985. 116p. 22cm. ISBN 90 6336 028 2. Prezo: 19,50 gld. Rabato de unu triono por samtempa aĉeto de minimume tri ekzempleroj, plus sendokostoj. Mendu de la Libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

"**Survoje al pontokulturo**": Materialoj pri la kosmopolita humanismo (homaranismo). Enhavo: *Homaranismo hodiaŭ*, *Marburga Manifesto*, *Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj* (Unuiĝintaj Nacioj), *Deklaracio pri homaranismo* (Zamenhof), *Preĝo sub la verda standardo* (Zamenhof). Jen la minimumo, kiun ĉiu esperantisto devus scii pri la hodiaŭa homaranismo! Vi ricevos la verkon kontraŭ 4 int. respondkuponoj, de: Homarana Asocio, Bismarckstr. 28, D-3550 Marburg, FR Germanio.

Ĉu la homaro travivos?

*La romano kiu avertis la mondon
pri la rezulto de nuklea milito*

Sur la bordo

de Nevil Shute

tradukita de K. G. Linton

(256p.) eld. Aŭstralia Esperanto-Asocio.

Prezo: 21,00 gld + sendokostoj
ĉe la libroservo de UEA

Alvoko de KSM

Dum la UK en Varsovio iu malhonestulo ŝtelis el la budo de **Koresponda Servo Mondskala** de UEA iu valizon, enhavantan dokumentojn de la Servo — interalie la aliĝilojn de tiuj, kiuj enskribiĝis en KSM dum la UK de **sabato ĝis mardo** inkluzive. Ni petas tiujn samideanojn skribi kiel eble plej baldaŭ al *Koresponda Servo Mondskala, Les Hortensias 2, 121 bis Bvd. Napoléon III, F-06200 Nice, Francio*, sciigante plenan nomon, kongresn-ron, sekson, naciecon, aĝon, profesion, kompletan adreson, la petitajn landojn kaj te-mojn, la nombron de dezirataj korespondantoj.



Language Problems & Language Planning

LPLP estas la nura revuo dediĉita al progresigo de la interkompreniĝo kaj solvo de la lingvorilataj problemoj pere de novevoluanta disciplino de la lingvo-planado. La revuo publikigas artikolojn, tiel teoriajn kiel praktikajn, kiuj konsideras politikajn kaj sociologiajn aspektojn de lingvoj en diversaj geografiaj regionoj. La artikoloj povas aperi en iu ajn lingvo, kun resumo en Esperanto. **LPLP** aperas sub la aŭspicioj de Centro de Esploroj kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo (instanco de UEA).

La revuon eldonas trifoje jare: University of Texas Press, P.O.Box 7819, Austin, Texas 78713, Usono. La abontarifoj estas: US\$27 (por institucioj) aŭ US\$18 (por individuaj abonantoj) jare. **LPLP estas abonebla ankaŭ ĉe la Libroservo de UEA.**

ESTONA RADIO PAROLAS ESPERANTON!

Je 87 08 06, Estona Radio komencis elsendojn el Tallinn en — kaj pri — Esperanto: la unuan kaj trian semajnon de ĉiu monato, ĵaŭde je 2230 laŭ Universala Tempo, kun ripeto la postan dimanĉon je 1025; ondolongoj 290m (1034 kHz) kaj 49,3m (6085 kHz). **Leteroj kaj informoj pri aŭdebleco** bonvenaj ĉe *SU-200100 Tallinn, Estona Radio, Esperanto*.

Modelbahn-hof Burghofen/ALKO GmbH/Euroform P.Z. kaj aliaj

Ni estas grupo de firmaoj multlandaj, uzantaj la internacian lingvon. La programo de la firmaoj:

- Kunkudrado de vestaĵoj laŭ mendo je malaltaj prezoj.
- Produktado de dentradoj por maŝinoj laŭdeziro.
- Livero de duonkonduktiloj por la elektroniko.
- Etaj metalpartoj por ĉiuj celoj, produktataj laŭ desegno.
- Agado por viaj komercaj intereso en Japanio kaj Honkongo.
- Modelfervojoj kun ĉiuj akcesoraĵoj. Livero ankaŭ al komercistoj.
- Memorigaj poŝtstampoj kaj poŝtmarkoj pri Esperanto, fervojo kaj fajrobrigado. (Listoj kontraŭ 1 respondkupono aŭ memorigaj stampoj iuj ajn.)
- Pli ol 1000 bild-poŝtkartoj pri fervojo el multaj landoj.

Ankaŭ aĉeto kaj interŝanĝo de supre menciitaj ŝtampoj, poŝtmarkoj kaj modelfervojoj, precipe el orientaj landoj.

Je intereso bonvolu kontakti:

A. Neussner,
Thüringer Str.3, D-3445 Waldkappel
Tel. 05656/634 aŭ 4923, telekso 993 283 alko d

5a Pariza Festivalo de Teatro kaj Kanzono



28-29 novembro 1987

**G. Waringhien • C. Piron • J. Le Puil
Persone • TESPAs • Krizalido • JEFO
kaj Trixini, la magiisto kun la blua ŝtono**

Biletoj po 35 FF por unu spektaklo, aŭ 160 FF por ses spektakloj; nur 140 por membroj de UFE aŭ eksterlandaj individuaj membroj de UEA. Hotelĉambroj rezerveblaj kontraŭ antaŭpago de la tuta restado (110 FF por nokto, por unu aŭ du personoj) — farenda nepre antaŭ la fino de septembro. Aliĝu ĉe: **UFE-Festivalo, 4 bis rue de la Cerisaie, F-75004 Paris, Francio.**

El la eldonejo de UEA:

VETERO KAJ KLIMATO DE LA MONDO

Denis Riley & Lewis Spolton/tr. Kris Long

Ĉu ankaŭ vi konfuziĝas inter cirusoj, stratusoj kaj kumulusoj? Ĉu vi scivolas pri la rilatoj inter etiopia sekiĝo kaj svislanda inundo? Aŭ ĉu vi nur volas prognozi, ĉu pluvos hodiaŭ? Ĉiukaze vi profitos el ĉi tiu renoma popularscienca verko, kiu per amaso da ilustraĵoj kondukas vin senerare tra la meteologia labirinto. 132p. 25cm. Mendu ĉe la Libroservo de UEA: 28,50 gld. plus sendokostoj; 1/3 rabato ekde tri ekz.

la amiko, kiu helpas instruistojn transformi komencantojn en parolantojn

Juna amiko

4 numeroj jare, 8,40 gld ĉe UEA aŭ nacivalute ĉe multaj perantoj. Petu specimenon de HEA, pf 193, H-1368 Budapest, Hungario.



La amiko,
kiu paroligas



Deseĝnaĵoj: Pavel Rak

Fokuso


*Kvaronjara
popularscienca
magazino*

64 paĝoj, 22 × 15,5 cm
Jarabono ĉe UEA 24 gld.

SENPAĜA PROVEKZEMPLERO:
HEA-FOKUSO, Pf. 193, H-1368
Budapest, Hungario

ESPERO POR SENESPERA MONDO:

Jen tre grava kaj urĝa mesaĝo pri la konfuzita mondo. Skribu por senpaga libreto al: **INTERNACIA BIBLIO-MISIO**, 29 Plantation Road, Poole, BH17 7LN, Britujo.



Ĵus aperis

VENIS VESPERO

nova infanlibro planita por denaska instruado de Esperanto, kun aparta enkonduko pri dulingva edukado de infanoj. Tradukita de Amri Wandel, laŭ H.C. Andersen. Havebla ĉe la libroservo de UEA (ĉ. 6 gld.) kaj ĉe ELNA. (\$3)

Esperanto 100-jara INTERNACIA SCIENCA SIMPOZIO

28-30 oktobro 1987/Universitato de Vieno

Esperanto en:

- la teoria lingvistiko
- la literaturscienco
- la aplika lingvistiko
- la historio.

Prelegos i.a. Back (Vieno), Brozović (Zadar), Companys (Parizo), Duc Goninaz (Aix-en-Provence), Eichner (Regensburg), Frank (Paderborn), Haupenthal (Saarbrücken), Maas (Saarbrücken), Mayrhofer (Vieno), Ölberg (Innsbruck), Piron (Ĝenevo), Schubert (Utrecht), Slaje (Graz), Silber (Mailand), Tonkin (Potsdam). Eblas ankaŭ prezenti mallongan referaĵon. **Laborlingvoj: Esperanto kaj la germana (interpretado prizorgata).**

Aŭspiciata i.a. de la federaciaj ministroj pri scienco kaj pri edukado, la urbestro de Vieno, la rektoro de la Universitato de Vieno, la ĝenerala direktoro de la Aŭstria Nacia Biblioteko, la aŭstria Unesko-komisiono, la Internacia Akademio de Sciencoj San Marino kaj Centro de Esploro kaj Dokumentado de Universala Esperanto-Asocio.



Informoj kaj aliĝoj:

"Esperanto 100-jara", Pf. 92, A-1183 Vieno.